

1981 marto

74-a jaro

n-ro 903(3)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Handikapuloj: Trarompo de la sonbaro

Vi trovos

tute ekscitajn nombrojn en la membrostatistiko de UEA sur la paĝo 59. Vi vidos tie, ke la Asocio pasintjare atingis rekordon, kiun ni nur pretere komentas en la rimarkoj pri tiu statistika trarigardo de la membraro en 1980. Sed, ĉu vi memoras nian pasintjaran tekston, sammonatan, samrubrikan? Verŝajne ne, ĉar ankaŭ ni ne certis pri ĝi antaŭ ol rerigardi tie. Nu, antaŭ unu jaro ni iom amplekse komentis la nombron de la landoj en kiuj ĉi tiu revuo havas legantojn. Temis pri 91. Ni skribis: "Ĉu ni sukcesos kompletigi la centon antaŭ la centa naskiĝtago de la lingvo en 1987?" Kaj nun, vidu ĉi-apude, post "Fondita. . ." ktp. — **LEGATA EN 102 LANDOJ!** Ankaŭ tion ni povas konsideri, laŭ la kovrilpaĝa titolo, "trarompo de la sonbaro". Skeptikaj, kiaj multaj el vi estas (cetere tio koncernas ankaŭ nin), vi demandas, kiel okazas ke UEA havas membrojn en 100 landoj, kaj ke oni tamen legas la revuon en du pliaj landoj. Ja, en du landoj ni havas abonantojn, kiuj ne estas samtempe membroj de UEA. Ni nun diru rapide "Ĝis!" antaŭ ol la Estraro inundos la domon por sia mezmarta roterdama kunsido. Agrablan legon en 102 landoj!

Enhavo

- 41 1981 — Internacia Jaro de Handikapuloj: Handikapuloj — dekonono de la homaro (Federico Mayor)
- 42 Handikapoj ofte sekvas el difektoj de la socio (Amadou-Mahtar M'Bow)
- 43 La Esperanto-movado kaj la handikapuloj: Ĉefe privataj iniciatoj (sm)
- 45 Lingva problemo: Demando de vivo aŭ morto (Slobodanka Ast)
- El la brita parlamento (John C. Wells)
- 46 Reagoj: Oni ne subtakso la lingvon (William Auld)
- 47 Landa agado: Du mil tricent movadanoj en Rumanio (Mioara Dobre)
- 48 Letero el Afriko: Kio nova en Zairio? (H. Bakker)
- 49 Virina agado: Por plani la direkton (Anna Brennan)
- 50 Faka agado: Nova organiza formulo por matematikistoj (François Lo Jacomo)
- Kalendaro: Kie oni atendas vin
- 53 Recenzoj: "Gvidlibro por supera ekzameno" de A. Pechan, "Baza literatura krestomatio" de V. Benczik (C.R.L. Power); "Janusz Korczak" de A. Szlăzakowa / J. Uśpieński (W.A.M. van Heugten); "Aŭtuno en la printempo" de Ba Jin / Laŭlum (W. Krikke); "Hieroglifo" de J. Pióro (B. Kolker)
- 54 Laste aperis. . . (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 55 TEJO-paĝo: Kio pri interna agado (S. Milojević)
- 56 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 58 Oficiala informilo de la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio; Nekrologoj (J. Enghardt, L. Jevsejeva, A. Logvin, K. M. Gusev, G. Salan)
- 59 La membraro de UEA en 1980 (membrostatistiko)
- 60 Ekzameno E (Bernard Golden); Anoncetoj

La kovrilo

La fotisto L. Solmssen (Unuiĝintaj Nacioj) peras al ni la radiantan, kvazaŭ luminiĝintan vizaĝon de knabo, kiu helpe de modernaj elektronikaj aparatoj sukcesas trarompi la sonbaron kaj la murojn de la silento. Ĉio ĉi okazas en lernejo por surduloj, en Trinidado aŭ Tobago, tiu du-insula subtropika ŝtato kiu gardostaras inter Atlanta Oceano kaj Kariba Maro. Ĉu vi povas imagi kiom da birdokantoj povas al orelo oferti tiu fantazie riĉa tropika faŭno? Ĉu vi provos ne forgesi, ke tiuj kantoj estis nemalkovrita mondo al ĉi tiu dekjarulo antaŭ ol la scienco sufiĉe progresis kaj atingis lian mondangulon? Multaj miloj da infanoj, ĉie tra la mondo, atendas sian elektronikan oreleon. Multaj handikapuloj, ĉie tra la mondo, atendas sian pecon de nia komuna vivo.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nw Binnenwg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto). Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). Legata en 102 landoj. Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo varias laŭlande. Petu de via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero 4,— gld.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1000, 1/2 p. 530, 1/4 p. 290, 1/8 p. 170, 1/16 p. 110. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso: ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri financo kaj administrado: s-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (050) 35 49 35.

Vicprezidanto kaj estrarano pri landa kaj regiona agado: d-ro Renato Corsetti, Via Strabone 1, I-00176 Roma, Italio; tel. (06) 29 26 07.

Vicprezidanto kaj estrarano pri kulturo: s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík, Islando; tel. (91) 3 73 01.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri planado: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII.22., H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23-274.

Estrarano pri informado kaj delegita reto: s-ino Ursula Grattapaglia, C.P. 04-0097, BR-70000 Brasília (DF), Brazilo.

Estrarano pri kongresoj kaj virina agado: s-ino Eliza Kehlet, Heideweg 20, B-2120 Schoten, Belgio; tel. (031) 51 46 36.

Estrarano pri faka agado: s-ro Petâr Todorov, ul. Vejen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario.

Estrarano pri esploroj, edukado kaj kunordigo de eksteraj rilatoj: prof. Humphrey Tonkin, Stouffer College House, 3700 Spruce St., Philadelphia, PA 19104, Usono; tel. (215) 382-5874.

Handikapuloj — de kono de la homaro

Unuiĝintaj Nacioj proklamis la jaron 1981 — Internacia Jaro de Handikapuloj. Pluraj specialigitaj organizaĵoj de UN dediĉas ĉi-jare apartan atenton al la problemoj, kiujn frontas de kono de la monda loĝantaro. Unesko dediĉis al la Jaro la tutan numeron de "Unesko-kuriero" por januaro 1981. Ni transprenis de tie la sekvan tekston, kiel ankaŭ la mesaĝon de Amadou-Mahtar M'Bow (p. 42).

ONI KALKULAS ke ĉ. 450 milionoj da homoj — proksimume dek procentoj de la mondloĝantaro — suferas iuspecan fizikan, sensan aŭ mensan handikapon. La nombro eble estas eĉ pli alta — ĉ. dek tri procentoj laŭ lastatempaj taksoj de la Monda Organizo pri Sano (MOS). Ankoraŭ pli serioze estas, ke nek el kvanta nek el kvalita vidpunkto oni povas antaŭvidi malkreskon de la problemo.

Al tiaj profundaj kaŭzoj de mankoj kaj kripliĝoj kiel parazitaj, infektoj dum gravedeco kaj akuta malsato dum la feta periodo kaj la unuaj monatoj de la

Foto: Michel Claude (Unesko)



La brajla skribo (laŭ la inventinto, L. Braille, 1809-1852) estas grava ligo de la blinduloj al la mondo de la vidantoj.

vivo, necesas aldoni lastatempajn tendencojn, ekz. la kreskantan nombron da transportaj kaj industriaj akcidentoj, kiel ankaŭ la efikojn de la alkoholismo kaj la drogsklaveco. La problemon de malavantaĝoj do same frontas la industriaj kiel la evoluantaj landoj. Kvankam la kaŭzoj kaj specoj de handikapoj eble varias, la prognozo estas (eĉ se pro malsamaj kialoj) ĉie same deprima.

Cetere, ĉi tiuj rimarkoj ne enkalkulas endemian militadon kiu, pro la amplekso kaj naturo de modernaj armiloj, povas alpreni katastrofajn proporciojn. Ni ne trovas pli helajn perspektivojn rigardante en tiun direkton.

Necesas fari ĉion home eblan por preventi handikapojn kaj kripliĝojn. Kaj kie, malgraŭ ĉiuj niaj penoj, ekzistas kazoj de kripliĝo, estas la devo de la aŭtoritatoj kaj de la socio ĝenerale fari ĉion eblan por trakti ilin kiel ili meritas, por plibonigi la situacion de handikapuloj tiom, kiom permesas la disponeblaj scioj, kaj por certigi, ke ili spertu kiel eble plej normalan vivon.

La Internacia Jaro de Handikapuloj proklamita de Unuiĝintaj Nacioj devas signi la komencon de vigla, imagoplena kaj kunordigita agado je la internacia nivelo, favore al ĉiuj suferantaj pro denaska aŭ akirita handikapo. La temo de la Internacia Jaro estas "plenaj partopreno kaj egaleco": plena egaleco, kaj partopreno tiel kompleta kiel permesas la personaj cirkonstancoj en ĉiu kazo. Bonŝance, la mondo ĉiam pli progresas al laŭpersona aliro al edukado kaj sanprizorgo. Ĉiu individuo estas unika, kaj tio devas esti la fokuso de ĉiu agado kaj ĉiu strategio.

La Internacia Jaro de Handikapuloj provizas al ni bonegan okazon meti la bazon — kaj tio estas efektive morala devo — por la detalaj individuaj zorgado kaj atento, kiujn bezonas kaj meritas handikapuloj. Kun sento de espero kaj atendo, kiun ni devas ne malpravigi, ili rigardas por vidi kiel la internacia komunumo prenas ilin en konsideron kaj prepariĝas por doni al ili ĉiun helpon, kiun ĝi kapablas doni.

En 1981, ni devas, ĉiu el ni, fari ĉion, kion ni povas, por konsciigi niajn ĉirkaŭulojn pri la amplekso de la problemo, kaj unuavice pri la neceso kunordigite kaj efike agadi por certigi preventadon, prizorgon kaj rekapabligon, plene ekspluatante niajn fontojn de sciencaj kaj teknikaj scioj. Cetere — kaj pri tiu punkto neniel estiĝu miskompreno — ni devas tion fari sen eĉ plej malgranda aludo al "bonfarado" aŭ provizado de mislokitaj almozoj. Temas pri afero de homaj rajtoj.

Kiu ajn trovas sin malhelpata realigi iujn el tiuj rajtoj, devus havi la okazon plene ĝui tiujn rajtojn, kiuj estas akordigeblaj kun lia aŭ ŝia stato. Lastatempe tiuj rajtoj, kiujn jam konvene rekonis Unuiĝintaj Nacioj, estas enskribitaj en la konstitucion de pluraj ŝtatoj. Ĉi tio estas ekzemplo imitinda, ĉar ĝi estas simbolo de la zorgo, per kiu ŝtato traktas ĉiujn siajn civitanojn, nek farante esceptojn nek montrante preferojn.

Miaopinie, la unua rajto de ĉiu handikapulo estas ne suferi handikapon. Alivorte, la plej grava afero estas

utiligi ĉiujn disponeblajn rimedojn por preventi la estiĝon de handikapo, ĉu fizikaj, sensaj aŭ mensaj. Tial ni devas sekvi niajn esplorojn por pli scii pri la origino de handikapo; samtempe — kaj jen kie kuŝas la plej frapaj malegaleco kaj maljusto — ni devas apliki la jam disponeblajn sciojn.

Eblas atingi tre multe pere de leĝofarado, sociala helpado, edukado, dungado kaj preventado. Multo estas lernenda el la spertoj de aliaj ŝtatoj per interŝanĝado de informoj kaj malkovroj. Se ni volas konscii pri la problemo, ni devas informiĝi pri ĝi, kaj se ni volas eniri la agadon, ni devas konscii.

La jaro 1981 devas inaŭguri epokon en kiu pli da zorgado estos dediĉita al ĉiuj handikapuloj kaj en kiu naciaj kaj internaciaj agadoj estos kunordigitaj. Kiel eblas tion atingi? Je nacia nivelo, pere de la laboro de diversaj organizaĵoj por kreado aŭ aktivigo de efike funkciaj sciencaj kaj publikaj informistoj; pere de enkonduko de preventaj agadoj (ekz. genetika konsilado, vakcinado, frua diagnozo, starigo de normoj por malhelpi aŭ malpliigi akcidentojn trafikajn kaj industriajn; la konservado de justa paco kaj tiel plu); pere de la evoluigo de speciala edukado, kiun karakterizas maksimuma grado de integriro kaj kiel eble plej individua maniero akordigebla kun la naturo kaj seriozeco de la handikapo; pere de plena rekapa-bligo kaj integriro en la laboristaron; pere de kiel eble plej plena partopreno en la kultura, politika, socia kaj ekonomia vivo; kaj, laste, per forigo de arkitekturaj kaj aliaj baroj.



Handikapo ofte sekvas el difektoj de la socio

RASISMO prenas diferencojn en la haŭtkoloro de individuoj aŭ en la kultura kutimaro de diversaj grupoj kaj faras el ili eksterajn kaj videblajn signojn de plena alieco kaj montrilon de esenca malsupereco aŭ super-eco. Ĉu modernaj socioj kapablas formi la necesan kuraĝon kaj montri la necesan klarvidon por forĵeti modelon de rilatado al la handikapuloj, kiu ofte originas el simila eksterpolado?

Handikapo, ĉu korpaj ĉu mensaj, foje rezultas el akcidentoj, sed ofte ili sekvas el la difektoj aŭ malsukcesoj — milito, malsato, malsano — de la socioj, en kiuj ni vivas. La viktimoj eliras stampitaj per profunda diferenco de siaj kunhomoj, diferenco, kiun tro multaj kredas neŝanĝebla. Tiamaniere, kaj en la industriaj kaj en la evoluantaj landoj, la handikapuloj — preskaŭ dekono de la homaro — povas trovi sin sub kondamno de ekzilo el la socio.

Niaj leĝoj kaj, pli ĝenerale, la tuta organizo de nia ĉiutaga vivo en ties plej simplaj agoj ŝajnas pretervidi la ekziston mem de la handikapuloj. La fakto ke ili estas en multaj kazoj forfermitaj en specialaj institucioj, dependigitaj de helpo kaj fortranĉitaj de la cetera

komunumo, plifirmigas la senscion de la socio pri iliaj veraj bezonoj kaj profundaj ambicioj. Ili tamen petas nenion pli, ol la eblon aliĝi al la diversaj aspektoj de la socia vivo kaj, kiel senperan sekvon de tio, ke la socio plene akceptu ilian partoprenon.

La kontentigo de ĉi tiu rajta postulo tamen necesigas duoblan manieron de traktado. Unue, necesas mobilizi ĉiujn materialajn, sciencajn kaj homajn rimedojn ne nur por malhelpi ĉirkaŭnaskajn akcidentojn kaj forigi la malavantaĝojn de handikapuloj, sed ankaŭ por ebligi al ili preni sian parton de respondecoj kaj ĝui la rajtojn egalbaze kun ĉiuj aliaj anoj de la socio. Tia estas la strebo de speciala edukado, kies ĉefa celo devas esti la certigo de ilia socia integriro.

Due, necesas ke la publiko edukiĝu kaj lernu bonvenigi la handikapulojn en sian sinon senrezerve, tamen senbrue kaj senkompleze, ĉar ili estas, rajte, plenaj anoj de la socio. Kun tiu fono, edukado unue kaj unuavice signifas la prezentadon de objektivaj informoj pri la ebleco, ke ili tiel rolu.

Amadou-Mahtar M'Bow
Ĝenerala Direktoro de Unesko

Je internacia nivelo, ĝi signifas kunordigitan agadon de la kompetentaj specialigitaj organizaĵoj (precipe la Monda Organizo pri Sano, la Organizo pri Nutrado kaj Agrikulturo de Unuiĝintaj Nacioj, la Internacia Labora Organizo kaj Unesko) kaj aliaj organizaĵoj kiel UNICEF kaj la Monda Nutrada Programo, kune kun la nemalhavebla helpo de la koncernaj neregistaraj organizaĵoj, kun la celo formi gvidliniojn kiuj, se ili estos akceptitaj kaj realigataj de la diversaj landoj, ebligas ke 1981 estu rigardata kiel la komenco de la fino de situacio, kiu urĝe alvokas senliman kunlaboradon en la kampoj kaj de homaj rajtoj kaj de solidareco inter ĉiuj homoj kaj landoj.

Kiel organizaĵo, kiu plej senkaŝe kontraŭstaras ĉian formon de diskriminacio, Unesko ne povas ne apogi la laŭeble plenan integrigon de handikapuloj en la socion, kun plena konscio pri la specifaj detaloj de ĉiu unuopa kazo. Ni devas firme kontraŭstari kategorigon, ĉar se la "rajto esti malsama" ricevos malĝustan interpreton, ĝi riskos fariĝi efektiva apartigo, dum la vera celo estas atingi la malon.

Tial necesas doni "specialan" helpon al gepatroj, kaj en iliaj nunaj kaj en iliaj estontaj planoj, en maniero adaptita al la seriozeco kaj neforigebleco de la handikapo, kiun suferas ilia infano. Tial necesas prioritare helpi la familion, ĉar, en la plej multaj kazoj, neniuj aliaj lernejoj aŭ trejnejoj aŭ institucioj povas aŭ rajtas ĝin anstataŭi. Pro tio necesas helpi kaj eduki handikapulojn en ĉiu ebla maniero. Tial necesas helpi kaj trejni specialajn instruistojn, kiel ankaŭ tiujn, kiuj iel kapablas kontribui al la integrigado. Laste sed ne malplej grave, tial necesas "speciale eduki" la socion kaj ĉiujn ĝiajn anojn, por ke ili povu faciligi integrigon kaj, kun kuraĝo kaj respekto por homa solidareco, mallarĝigi la "malsamecon" kaj "dependecon".

Se la Internacia Jaro de Handikapuloj estos ĉefe jaro por la kiel eble plej kompleta integrigo de ĉiu individua handikapo, ĝi heroldos ankaŭ novan, klarvidan manieron trakti aferon, kiu plej profunde koncernas nin ĉiujn.

Ĉe sia lastatempa Ĝenerala Konferenco en Beogrado, Unesko unuanime akceptis rezolucion, kiu invitas ĝiajn ŝtatojn-membrojn doni apartan atenton al starigo kaj realigo de ĉiuj agadoj, kiuj povus helpi handikapulojn. Landoj de ĉiu angulo de la tero kaj je ĉiu nivelo de evoluo donis voĉon, pere de siaj reprezentantoj, al sia profunda dediĉiĝo al la problemoj de handikapuloj. La agadoj, kiujn iuj el ili jam decidis sekvi, aŭ nun planas, donas ankoraŭ pliajn motivojn por espero.

Federico Mayor

Federico Mayor, hispana biokemiisto, estas asista ĝenerala direktoro de Unesko. Eksa stabano de Triunua Kolegio, Oksfordo, li estis siatempe profesoro pri biokemio kaj direktoro de la fakultato pri biokemio kaj molekula biologio ĉe la Aŭtonoma Universitato de Madrido. Li estis ankaŭ rektoro de la Universitato de Granado kaj hispana vicministro pri edukado kaj scienco. Li jam produktis ampleksan sciencan verkaron, inkluzive studojn pri biokemia analizo de la kaŭzoj de mensa postrestado.

LA ESPERANTO-MOVADO KAJ LA HANDIKAPULOJ:

Ĉefe privataj iniciatoj

VERŜAJNE eĉ ne okazis aliaj sukcesaj provoj organizi la handikapulojn en la Esperanto-movado, krom en la kazo de la blinduloj. Aliflanke, ĝuste la historio de la blindula Esperanto-movado estas tute longa kaj impona: La unua Esperanta gazeto por blinduloj, *Esperanta ligilo*, estas eĉ pli aĝa ol nia revuo, ĉar ĝia unua numero aperis jam en 1904. La internacia organizaĵo de blindaj esperantistoj unue fondiĝis en 1924, plurfoje ŝanĝis la nomon, kaj en sia nuna formo, kiel Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE), ĝi ekzistas ekde 1950. En 1980 LIBE havis 572 membrojn. La unua kongreso de blindaj esperantistoj okazis en 1921 en Prago, kvankam jam en la Universala Kongreso en Kembriĝo (1909) partoprenis granda grupo de blinduloj. Nun tiuj kongresoj regule okazas lige al la Universalaj Kongresoj, tiel ke la 48a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj okazis pasintjare en Stokholmo, dum la 49a estas planata por ĉi tiu jaro en Zagrebo (Jugoslavio).

Kian atenton montras la Movado ĝenerale al la blindaj esperantistoj? Malmultan kaj okazan nur, almenaŭ en la internacia kadro. UEA iom helpas pere de la Universalaj Kongresoj, kiuj en sia aliĝilo havas rabatitan kotizon por blinduloj kaj, feliĉe, rubrikon por donacoj al "Blindula Kaso". Tiuj donacoj estas kutime malgrandaj sed multaj, kaj foje kolektiĝas imponaj sumoj. En sia pli nova historio UEA neniam eldonis ion brajle. Tion, laŭ nia scio, ne faris ankaŭ aliaj internaciaj movadaj organizaĵoj. Ĝenerale, iom da atento al la blindaj esperantistoj do okazas, iel rutine, sen apartaj zorgoj, sen multaj klopodoj. Pri aliaj handikapuloj oni pli-malpli nenion aŭdas en la Movado, kvankam malfacilas kredi, ke ili ne ekzistas. (Menciinda estas provo, antaŭ deko da jaroj, krei invalidan E-organizaĵon.)

Aliflanke, pluraj tute seriozaj entreprenoj favore al la handikapuloj okazas en la Movado kiel rezulto de privataj, individuaj iniciatoj, sen multa aŭ sen ajna helpo de la movadaj organizaĵoj. Jen kelkaj el ili:

AVERTO

UEA HAVAS
BELAN KUTIMON
SENDI

EN LA UNUAJ TRI MONATOJ DE LA JARO
ĈI TIUN REVUON ANKAŬ AL TIUJ, KIUJ
ANKORAŬ NE PAGIS SIAN ABONON. NU,
TIU LUDO NUN FINIĜIS: TIO ĈI ESTAS LA
LASTA NUMERO, KIUN VI RICEVAS AN-
TAŬ OL REKOTIZI POR ĈI TIU JARO. ???

Agado E3, pri kiu ni amplekse skribis en la numero de julio-aŭgusto 1979 (p. 128), ekzistas jam ĉ. 14 jarojn kaj ĉiujare sukcesas kolekti proksimume dekon da miloj da guldenoj, por helpi la blindulojn en Afriko. Tiun kampanjon gvidas: s-ro Jacques Tuinder, Hene-gouwenlaan 35, 1966 RH Heemskerk, Nederlando. Ĉiam eblas kontribui monsum(et)on por tiu nobla celo. Se vi havas problemojn kiel sendi la kontribuon, sendu ĝin al UEA, kiu volonte plusendos ĝin al la ĝusta adreso. Tre efika maniero helpi estas ankaŭ la aĉeto de specialaj (belaj!) glumarkoj "Blinduloj vidas". Unu folio kun 32 glumarkoj kostas nur 3,00 guldenojn. Ne forgesu do peti ĝin okaze de via venonta libromendo ĉe UEA!

Simile estas pri la kampanjo "Helpu al la lepruloj", kiun ankaŭ dum pluraj jaroj sukcese gvidas la hungara esperantisto d-ro Jozef Kondor (adreso: Johannes Gymnasium, D-5420 Lahnstein, FR Germanio). Pri tio, same, eldoniĝas novaj glumarkoj, plurkoloraj kaj belaj, kiuj ne nur helpas la malsanulojn sed ankaŭ propagandas Esperanton. Ankaŭ ili estas aĉeteblaj ĉe la Libroservo de UEA kontraŭ nuraj 3,00 guldenoj.

Tute apartan atenton meritas du private eldonitaj broŝuroj, kiuj celas klerigi la ĝeneralan publikon pri la necesa atento en la rilatado kun handikapuloj. Temas pri *Ne tiel sed ĉi tiel; Simplaj sugestoj por agrabla kontakto kun blinduloj*, de Herman van Dyck, en traduko de J. Koning k.a., kaj pri *Ĉu ne eblas ĉi tiel?; Por facilaj kontaktoj kun move handikapitoj*, de Maurits Wagemans, en traduko de grupo da Esperanto-studentoj en la Universitato de Amsterdamo. Ambaŭ broŝuroj estas 32-paĝaj kaj ilustritaj. Kvankam ili kostas nur po 2,70 guldenojn, ili ĝis nun ne vendiĝis aparte sukcese, diras s-ro Rob Moerbeek, kiu private financis la eldonon de tiuj du utilaj libretoj. Ambaŭ broŝuroj estas aĉeteblaj ĉe la Libroservo de UEA.


Ni menciui ĉi tie ankoraŭ du eldonaĵojn, kiuj rilatas la handikapulojn, sed kiuj devus esti interesaj ankaŭ por

la ĝenerala publiko. En 1978, la bulgara handikapulo Kiril Kalĉev eldonis 12-paĝan broŝureton *La hardigado de la korpo* (3,30 gld.), kiu rakontas proprajn spertojn en la sukcesaj klopodoj venki movan handikapon. Pasintjare, la belga sociologo (blindulo) José Starck eldonis sian ampleksan studon *Analizo de la interrilatoj inter la blindularo kaj la diversaj socioj de la eŭropaj industriigitaj landoj* (30,00 gld.), kiun ni recenzis en la numero de decembro 1980. Ŝajnas, ke la publiko ankoraŭ ne malkovris tiun valoran sciencan studon.

Ni ne povas ĉi tie revui la staton de la brajla gazetaro en Esperanto kaj ĝenerale de la brajla eldonado de Esperantaj libroj. Ni ne povas fari tion, ĉar ankaŭ ni, kiel la resto de la Movado, apenaŭ estas bone informitaj pri la demando. El okazaj sciigoj, kiuj atingas nin, eblas konkludi, ke eĉ la blinduloj, la sola organizita grupo de handikapuloj en la Esperanto-movado, estas lasitaj solvi mem siajn problemojn, kiel ajn grandaj ili estu. Kaj ilia grandeco ofte estas tia, ke la ĝenerala Movado tute ne povas imagi ĝin. Ekzemple, Nederlanda Societo de Blindaj Esperantistoj pasintjare eldonis brajle la konatan progresigan lernolibron *Paŝoj al plena posedo* de W. Auld. Tiu libro, kiu en sia ordinara eldono ĝis antaŭ nelonge kosis nur dekon da guldenoj, en sia brajla eldono kostas 150,00 guldenojn! Ni iom tro trankvile lasas, ke la blindaj esperantistoj mem trovu la grandegajn rimedojn, kiujn postulas la brajla eldonado eĉ de ne aparte ampleksaj sed tre necesaj libroj.

La konsiderinda spaco, kiun ni en ĉi tiu numero donas al la Unesko-materialoj pri la Internacia Jaro de Handikapuloj, ne servas nur por ĝenerale subteni la klopodojn de la monda organizaĵo kun kiu UEA intime kunlaboras, sed ĝia celo estas konsciigi la Esperanto-movadon, ke ni havas nian propran, movadan demandon de handikapuloj. Ni klopodu, ke la movada atento al tiu problemo estonte ne limiĝu al etaj rutinaĵoj kaj hazardoj.

sm



La stokholma LKK: Meze (kun nigraj okulvitroj) staras Birger Vigen, kiun blindeco ne malhelpis esti inter la plej aktivaj

Demando de vivo aŭ morto

Eĉ ni en la Movado malofte kaj malvolonte traktas lingvajn problemojn interne de difinita lando. La jugoslavia magazino "NIN", el kiu ni transprenas (koncizigite) la sekvan tekston, skribas pri la nuna pozicio de la kimra lingvo en Britio. Ankaŭ la fotoj venas el la sama fonto.

KIMRION kaj kimrojn la angloj plej volonte mencias en ŝercoj. Kiam ili ne rakontas anekdotojn pri irlandanoj, ili ridas pri kimroj. Ili diras: kimroj estas irlandanoj, kiuj ne sciis naĝi.

Antaŭ nelonge, kiam Gwinfor Evans, prezidanto de la kimra nacia partio Plaid Cymru, ekminacis per malsat-striko, se la registaro ne plenumos la promeson donitan en la antaŭelekta kampanjo, laŭ kiu la kimroj ricevos televidan kanalon en sia lingvo, aŭdiĝis ankaŭ aliaj voĉoj el ĉi tiu parto de Britio.

"La registaro rompis la promeson. Mi montros, ke la kimroj ne rompas donitajn promesojn", mesaĝis pere de televido, gazetaro kaj multnombraj renkontiĝoj Gwinfor Evans. Ŝajnas, ke la maljuna kimro aspektis tute konvinke, ĉar la registaro ŝanĝis sian decidon, senpere antaŭ la komenco de la "granda fasto ĝis la morto" de Evans, kaj promesis, ke ĝis la jaro 1982 ekos ankaŭ la kimra televido.

For de la urba bruoj, en la vilaĝeto Betlehem, ni serĉis la kimron pri kiu dum semajnoj parolis la tuta Britio.

Estas malfacile kredi, ke tiu mildmiena, takta, 70-jara onklo en la tradicia uniformo de insula ĝentlemano ("Harris tweed", flanela ĉemizo, lana kravato) estas unu el la plej radikalaj ĉi-tieaj politikistoj.

"Ĉu la televida kanalo en la kimra lingvo efektive estas demando de vivo aŭ morto? Ĉu vi ankaŭ ĝis nun, en du el la ekzistantaj kanaloj, ne havis dekon da programhoroj semajne en via lingvo?" — ni demandis la gastiganton.

"Tio estas la vivdemando ne nur por mi sed unuavice por la kimra lingvo, por nia nacio. Eble tio estas nia lasta malespera provo konservi la kimran kulturon kaj nian nacian identecon. La televido estas nuntempe la plej potenca ilo. Ni deziras, ke nia voĉo aŭdiĝu ankaŭ en la politiko. Oni hodiaŭ gajnas kaj perdas la elektojn en la televido", diras en la interparolo por *NIN* Gwinfor Evans.

La kimroj estas la plej malnovaj loĝantoj de Britaj Insuloj, kaj ilia praa lingvo estas unu el la plej antikvaj



La muroj tra Kimrio atestas la batalon por la lingvaj rajtoj

El la brita parlamento

MALGRAŬ la salutinda sukceso de la Esperanta Parlamenta Grupo en Westminster, la brita parlamento restas reakcie rezista al ideoj pri lingva egalrajteco. En la mezo de februaro ĝia Suba Ĉambro (House of Commons) rifuzis la leĝproponon de Donald Stewart, per kiu la uzo de la gaela lingvo estus protektata kaj akcelata. Troviĝis nur 36 parlamentanoj, kiuj voĉdonis por daŭrigi la debaton pri la leĝpropono: ĉar necesis 100, la debato devis ĉesi. Laŭ la indignaj vortoj de s-ro Stewart, la voĉdonado montris "krudan malrespekton por la rajtoj de konsiderinda skota minoritato". Pli frue, li malfermis la debaton per parolado en la skotgaela lingvo mem. Interese estas, ke la Prezidanto (Speaker) de la Suba Ĉambro estas parolanto de la kimra, la sola minoritata lingvo de Britujo kies rajtoj estas certgrade garantiitaj (per Welsh Language Act, 1967). Li trovis la gaelan, kiel ĝin parolis s-ro Stewart, "preskaŭ tiel muzika, kiel la kimra". Sed la registara

proparolanto, la Skota Subsekretario Alex Fletcher, diris ke la paŝoj menciitaj en la leĝpropono estus multekostaj, kaj nenecesaj por la pluvivo de la gaela. "Nenio pravigas la timojn, ke la skotgaela malprosperas, malkreskas, aŭ mortas", li diris. (Laŭ raporto en *The Guardian*.)

Ankoraŭ alia atingo de la brita parlamento, ĉi-foje pli pozitiva, estis raportita la 17an de februaro: la unua fojo, kiam parlamentaj laboroj okazis (parte) en la kimra lingvo. Temis pri la Selektita Komitato pri Kimraj Aferoj, dum kies sesio en Caernarfon membroj de la Asocio por la Kimra Lingvo atestis tiulingve. Ĉar nur du el la ok anoj de la Selektita Komitato scipovas plene la lingvon, interpretistoj interpretis. Paŝon post paŝo la mondo komencas rekoni la rajtojn de minoritataj lingvoj. Tio devos fine konduki al la radikala solvo de la tutmonda lingvo-problemo — la solvo, por kiu pledas ni esperantistoj. Nur tiel oni protektos la rajtojn de ĉiuj lingvoj.

John C. Wells

(El *Bulteno* de Londona Esperanto-Klubo.)

Gwinfor Evans:
**"Nia lasta malespera
 provo konservi la
 nacian identecon"**



vivantaj lingvoj en Eŭropo (pli malnova ol la angla, kun lige al tio ankaŭ multe pli malnova literaturo). La kimra lingvo, tamen, rapide formortas.

En la pasinta jarcento, naŭdek procentoj de la loĝantaro de ĉi tiu parto de Britio parolis la kimran lingvon; hodiaŭ nur unu kvinono de 2 750 000 kimroj havas ĝin kiel gepatran lingvon. La kimra longtempe estis malpermesita lingvo, taŭga nur por "sovaĝaj montaranoj".

La morto-minaco de Evans estas nur la plej drameca ĉenero en batalo, kiun por la kimra lingvo jam de jaroj kondukas ĉi-tieaj studentoj, politikistoj, akademianoj, laboristoj, dommastrinoj. Al la manifestacioj, marŝoj, bruaj mitingoj kaj akraj polemikoj en la gazetaro, lastatempe aldoniĝas ankaŭ detru-atakoj. Antaŭ nelonge, tri gvidaj akademianoj de la Universitato de Kimrio efektivigis veran ĝejmz-bondan* mision: meze de malvarma, pluva nokto, ili malmuntis ĉi-tiean televidan relajson. La batalo por la kimra lingvo estas interrom-

* Laŭ James Bond, brita spiono-heroo de serio da ekstravagancaj romanoj, kiuj poste fariĝis eĉ pli ekstravagancaj filmoj.

pita en kelkcento da kazoj per plurmonataj verdiktoj pri malliberigo.

Ekzistas kimroj, kiuj opinias, ke ĉi tiu tuta tumulto ĉirkaŭ la kimra lingvo estas nur elitisma ŝatokupo kaj, ke almenaŭ nuntempe tio ne estas la plej grava problemo en Kimrio. En ĉi tiu parto de Britio la animstato eventuale estas difinebla kiel danĝera miksaĵo de amaro kaj malespero. Fermiĝis dekoj da minejoj, fabrikoj, ŝtal-uzinoj; 150 000 homoj restis sen laboro; multaj — kun kompenso — frue pensiigis. La havenon Port Talbot la najbaraj urboj envie kutimis nomi Eldorado, kaj siatempe Hugh Gaitskelli**, kiam ĉi tie malfermiĝis la plej moderna ŝtal-uzino de Eŭropo, diris, ke Port Talbot estas "simbolo de la brita fido al la estonteco". Hodiaŭ tio estas urbo-fantomo fermitaj fabrikaj haloj, senhomaj doko, malgajaj vizaĝoj antaŭ laboroficejoj. Port Talbot estas mikrokosmo de la brita industrio kaj ĝiaj nuntempaj problemoj.

Kiam s-ino Thatcher antaŭ nelonge vizitis Cardiff, ŝi apelaciis, ke ĉ. 125 000 senlaboraj kimroj (nun tiu nombro estas jam 145 000) levu la ankron kaj ekiru al la pli evoluintaj partoj de Britio: "Cetere, la kimroj kutimiĝis migri serĉante laboron." Gwinfor Evans atentigas, ke la britaj politikistoj parolis same ankaŭ en la tridekaj jaroj de la jarcento. Tiam duona miliono da kimroj elmigris kaj Kimrio neniam plu resaniĝis.

Kimroj foriras, kaj angloj alvenas. Ili aĉetas la malnovajn vilaĝajn domojn, konstruas somerdomojn. Angligo estas rapida, sed ankaŭ la batalo, ke la kimra lingvo pluvivu estas okulfrapa ĉiupaŝe. Anglalingvaj nomoj trastrekitaj per verda farbo, sloganoj en la kimra sur la muroj. Antaŭ duonjaro, ondo da incendioj trafis la somerdomojn de la anglaj alvenintoj.

Slobodanka Ast

(El la jugoslavia magazino *NIN*)

** Antaŭa gvidanto de la brita laborista partio.

REAGOOJ:

Oni ne subtaksu la lingvon

KIEL KONATE, mi neniam volas meti teoriajn limojn al la kapablecoj de Esperanto, ĉar ĝis nun ĝiaj latentoj estas nur supraĵe esploritaj. Releginte lastatempe la recenzon de Constantin Dominte pri mia verko *Pri lingvo kaj aliaj artoj* (*Esperanto*, marto 1980, p.51), mi trovis jenon:

"Ni pensu nur pri la malgranda ekzemplo de la dustrofa poeziaĵo de Heine, *Ein Fichtenbaum steht einsam*, bela peco de pejzaĝo kaj samtempe **erotika** liriko, ĉar la norda **pino**, revanta je la suda **palmo**, estas en la

germana **virgenra** substantivo, dum la objekto de ĝia revo estas **ingenra**. En Esperanton ĝin tradukis Zamenhof mem... sed la rezulto estis nur pripejzaĝa lirikaĵo; la erotika sugesto perdiĝis pro la neŭtra genreco de la du substantivoj. Estas en ĉi tiu punkto iu **baro**, kiun simple **la lingvo** metas antaŭ la tradukon."

Kaj tamen mi opinias, ke eĉ tiun ŝajne nevenkeblan problemon Esperanto kapablas solvi: alia rimedo, sed sama rezulto. La version — *Er träumt von einer Palme*, oni povas redoni jene — *Ĝi sonĝas pri palmino*.

Se necese nenio ankaŭ malhelpas aludi al la pino per **li** anstataŭ **ĝi**. Se tiel forte sentiĝas en la germana la ineco de la palmo, oni rajtas kaj povas sentigi ĝin en Esperanto. Tio estas eĉ avantaĝo de Esperanto, ĉar simila ebleco ne ekzistis, ekzemple, en iu lingvo kies vortoj **pino** kaj **palmo** hazarde estus samgenraj!

Mi ripetu: oni ne subtaksu Esperanton!

W. Auld

2300 movadanoj en Rumanio

Ekzistas landoj de kie konstante venas novaĵoj, tiel ke oni komencas ricevi la impreson, ke tie io efektive okazas. Male, el aliaj landoj longe venas neniam vivsignoj kaj oni ektimas, ke la Movado tie forvelkas aŭ spertas ian apartan krizon. Ni estis pretaj eksupozi ion similan pri Rumanio, Montrigas nun, ke la bonaj aŭguroj pri la plena revigliĝo de Esperanto en tiu lando estas verve realigataj. Vi mem konstatos tion el la ĉi-sekva artikolo.

”LA FAKTORO, kiu determinas la opiniojn en la moderna socio, estas la scienco. Nek la popolamasoj nek la registaroj havas intereson nei la sciencajn konkludojn. Kiu volas progresi, tiu bezonas la argumen-



El pluraj vidpunktoj Rumanio estas insulo de aparta kultura identeco en tiu parto de Eŭropo: Ĉu tiaj cirkonstancoj estas aparte fekunda grundo por Esperanto?

tojn, la kuraĝon kaj la konsekvencon de la scienco. Ni enkonduku Esperanton en la sciencon kaj la sciencon en la tutan Esperanto-agadon!” Tiuj agad-principoj, kiujn prof. d-ro Ignat F. Bociort unue eldiris en la malferma solenaĵo de la 63a UK en Varno (1978), estis ripetitaj antaŭ nelonge en la 3a tutlanda renkontiĝo de la rumanaj esperantistoj, okazinta en la Universitato de Timișoara. La vortoj de prof. Bociort, prezidanto de la Kolektivo Esperanto-Interlingvistiko (KEI) en la Akademio pri Sociaj kaj Politikaj Sciencoj (ASPS) de Rumanio, servas kiel efika gvidlinio de la landa Esperanto-organizaĵo. Tion plej bone pravas la praktikaj rezultoj: en nur kelkaj jaroj la Esperantomovado en Rumanio rapide kreskis, kio okazis ankaŭ al ĝiaj prestiĝo kaj amaseco.

En la ĉefaj universitataj urboj de nia lando, Esperanto unue penetris en la akademiajn rondojn. Kiel nedeviga studobjekto Esperanto nun estas instruata dum tri jaroj (du horojn semajne) en tuta aro da filologiaj fakultatoj. La kursojn partoprenas ankaŭ alifakaj gestudentoj. La aludita penetro en la akademiajn rondojn signifas, ke Esperanto elbatalis regulan lokon en sciencaj komunikaĵoj, referatoj, debatoj, ke ĝi estas ofta temo de diskutoj en la akademioj de Timișoara, Bukareŝto, Iași kaj en la Societo de Filologiaj Sciencoj de Rumanio.

Iuj el la maljunaj, gravaj rumanaj lingvistoj, kies sinteno al Esperanto antaŭe estis negativa aŭ ignora, nun ŝanĝas sian vidpunkton kaj gratulas la mezan generacion pro la sukcesoj sur la kampo de la Internacia Lingvo. Nun ne estas malfacile trovi lingvistojn, kiuj iam skribis kontraŭ Esperanto, kaj kiuj hodiaŭ apogas la Esperanto-kursojn en la universitatoj. Plej grave estas, ke nuntempe neniu en Rumanio kontraŭas publike Esperanton. Male, aperis pluraj traktaĵoj en kiuj oni forte apogas la Internacian Lingvon. La plej grava el ili estas la libro de prof. d-ro Arion Vraciu (Universitato de Iași), *Lingvistică generală și comparată* (Ĝenerala kaj kompara lingvistiko). En tiu 344-paĝa libro por la studentoj kaj junaj esploristoj, aperinta pasintjare en Bukareŝto, tuta ĉapitro traktas objekte kaj kompetente la problemon de internacia lingvo. En Timișoara aperis en nekutime granda eldonkvanto (kaj rapide elĉerpiĝis) la 298-paĝa volumo *Lucrări practice de esperanto-interlingvistică* (Praktikaj tekstoj de Esperanto-interlingvistiko) de prof. Bociort. Tiu libro unue aperis en 1979, kaj reaperis en 1980. Lastatempe estas eldonita de la sama aŭtoro ankaŭ *Curs de gramatică limbii esperanto* (240-paĝa). Temas pri kursolibro por la studentoj de la dua studjaro. La libro devis aperi en eldonkvanto pluroble pli granda ol la kursoj de aliaj

lingvoj, kaj por la fino de 1981 oni jam planas novan eldonon.

En la Universitato de Bukareŝto, grupo de aŭtoroj, sub la gvido de Constantin Dominte, aperigis du vortarojn: Esperanta-rumana kaj rumana-Esperanta. Kompreneble, ankaŭ tiuj du vortaroj rapide elvendiĝis. En alia universitato, tiu de Cluj-Napoca, Viorel Păltineanu en 1980 aperigis seplingvan vortaron, en kiu unu el la lingvoj estas Esperanto.

Studojn, artikolojn, recenzojn de Esperantaj libroj, sciencajn komunikaĵojn ktp. aperigis ankaŭ prof. d-ro Lucia Wald, Ioana Prioteasa, d-ro Hans Bettisch, d-ro Hans Gehl, d-ro Romeo Poenaru, kaj precipe la estraranoj de KEI: d-ro Cezar Apreotesei, prof. Bociort, prof. Aurel Boia kaj C. Dominte. Pli ol 30 ĝestudentoj el Timișoara kaj Bukareŝto faris sciencajn esperantologiajn referaĵojn, el kiuj multaj jam aperis aŭ estas aperontaj. Estas jam pretaj la ĉefaj preparlaboroj por ankoraŭ ĉi-jare ekeldoni periodaĵon *Lingvo kaj scienco*.

Aparte menciindas, ke la vidpunktoj de KEI ofte penetras ankaŭ en aliajn sferojn pere de pluraj intervjuoj (Bociort, Boia, Apreotesei, Dominte) en la gazetaro, radio kaj televido. Al la grava verko *Viitorul omenirii în conștiința contemporană* (La estonteco de la homaro en la nuntempa konscio) de la sociologo Victor Isac kontribuis pri Esperanto prof. Bociort.

Tre grava rezulto de tiu agado en la sciencaj rondoj estas la kreiĝo de Esperanto-sekcio en la prestiĝa Societo de Filologiaj Sciencoj (SFS), komence de decembro 1980. Principe, tiu Societo membrigas ĉiujn lingvistojn kaj ĉiujn lingvo-instruistojn en Rumanio. Ĝi havas filiojn en pli ol kvardek lokoj tra la tuta lando, kie nun rapide fondiĝas Esperantaj sekcioj. Pere de SFS nun eblas kolekti ankaŭ kotizojn (kio ne eblis pere de KEI), kaj tio kreos la necesan materian agadbazon. Ĉar SFS estas ligita al la ministerio de edukado, Esperanto nun havas malfermitan vojon al ĉiugradaj lernejoj, al pedagogia eldonejo ktp.

Nun KEI faras statistikon pri la esperantistoj en Rumanio. Montriĝas, ke la lando havas multe pli da movadanoj ol oni supozis. Ĉiufoje kiam la gazetaro anoncas aperon de nova Esperanto-libro aŭ la komencaĵon de nova kurso, venas inundo da leteroj de nekonataj esperantistoj aŭ tiuj kiuj volus lerni la lingvon. Nur en Timișoara nun funkcias dek Esperanto-kursoj. La ĝisnunaj reagoj al la enketo pri la nombro de esperantistoj montras, ke en la lando ekzistas pli ol 2 300 movadanoj, plejparte junaj, ĉar la meza aĝo de la rumana esperantisto estas 24 jaroj! Tio instigis al fondo de aparta junulara sekcio, pri kio ĉi tiu revuo raportis en la numero de decembro 1980.

Mioara Dobre

LETERO EL AFRIKO:

Kio nova en Zairio?

LA RESPONDECULO de la Esperanto-Instituto de Zairio, s-ro Nduantoni Bakidila Ngangu (B.P. 13, Lukala), raportis al UEA, per letero de la 3a de februaro 1981, pri la stato de Esperanto en tiu vasta afrika lando.

S-ro Ngangu estas lernejestro, 38-jara, en elementa lernejo, kun 900 gelernantoj 6–16-jaraj, en 19 klasĉambroj. Li organizis kursojn de Esperanto por siaj geamikoj kaj membroj de la familio; ĉirkaŭ 120 el ili finis la elementan gradon. Li prelegis en la Supera Pedagogia Instituto en Mbanza-Ngungu, la 14an de oktobro 1980. Mankis sufiĉa propaganda materialo, tamen du grandaj afiŝoj de SAT-Amikaro vekis interesiĝon, kaj la prelego bone sukcesis. Same la du kunvenoj pro la Zamenhof-Tago, la 15an kaj 25an de decembro 1980.

S-ro Ngangu tamen spertas senton de izoliteco kaj de nesufiĉaj monrimedoj, des pli ke la salajroj en Zairio estas tre malaltaj. Ili apenaŭ sufiĉas por la bazaj bezonoj de la homo kaj familianoj; ne restas io por financi Esperanto-agadon. Subvencioj ne estas haveblaj.

Esperanto povus esti interkomprenilo inter la diversaj popolgrupoj interne de la lando (kie oni parolas malsamajn lingvojn: lingala, svahila, ĉiluba, kikonga) kaj kun eksterlando. Nun la franca ludas tiun rolon, sed

ekzistas iagrade la konscio, ke Afriko ne plu devus toleri la lingvon kaj kulturan influon de la grandaj mondaj, ekskoloniaj potencoj. Agado en Zairio devus konsisti el: 1) seminarioj kaj kongresoj por praktiki la lingvon parole; 2) lerniloj, en la formo de libroj kaj kasetoj, foje kun magnetofono; 3) propagandaj vojaĝoj kaj vastskala diskonigado per amasaj kursoj (senpagaj); 4) enkonduko de Esperanto en la Zairan Universitaton.

Tio lasta povus plenumiĝi se troviĝus kompetenta profesoro. Ĝis nun neniu povus esti kandidato. S-ro Ngangu mem deziras ekstudi en la Esperanto-fako de la Universitato de Aix-en-Provence (Francio) por kompetentiĝi pri la lingvo kaj pli bone koni la Movadon en Eŭropo. Tamen, evidente, mankas la mono por tio.

La monata revuo *SAT-Amikaro* de la samnoma esperantista organizaĵo por franclingvanoj publikigis alvokon pri helpo al la planoj de s-ro Ngangu ekstudi en Aix-en-Provence. Ankaŭ UEA volonte aliĝos al tiu alvoko, se tion permesos la disponeblaj rimedoj en la Fondaĵo Azio-Afriko. Granda parto de tiuj rimedoj nun estas rezervita por kelkaj eldonprojektoj pri Esperanto-lerniloj en aziaj kaj afrikaj lingvoj. Via subteno al la Fondaĵo ĉiam estas bonvena. Ankaŭ el landoj kun transpagaj malfacilaĵoj eblas sendi donace E-librojn, kies valoron oni kreditos al la Fondaĵo.

UEA, en la kadro de sia Regiona Agado, esploras la situacion en ĉiuj landoj de Afriko, por subteni la agadon tie kie ĝi ŝajnas plej realisma kaj promesplena.

H. Bakker

Por plani la direkton

DEK TRI VIRINOJ el ses landoj renkontiĝis en Rotterdam, en la semajnfino de la 28a de februaro ĝis la 1-a de marto, por plani la estontan direkton de la virina agado en UEA. La kunsido estis organizita de la Komisiono pri Virina Agado (KVA), kaj ĉeestis virinoj el Belgio, Bulgario, Francio, FR Germanio, Nederlando kaj Svedio.

En la unua tago, la partoprenantoj diskutis kelkajn el la rekomendoj en la UN-Agadprogramo por la dua duono de la Jardeko por Virinoj, kiu estis akceptita dum la UN-konferenco de virinoj en Kopenhago pasintjare. Ne eblis diskuti la tutan dokumenton, kiu havas 287 paragrafojn, el kiuj, cetere, multaj estas ekster la agadtereno de UEA. Tiuj, kiujn oni elektis kaj tradukis por diskutado, temis ĉefe pri edukado kaj informado. Tiuj estas la du kampoj pri kiuj praktike eblas atingi ion en la Esperanto-movado.

La plej interesaj paragrafoj por la partoprenantoj estis tiuj pri la pozitiva prezento de virinoj kaj virinaj temoj, kreado de programoj por forigi antaŭjuĝojn kaj tradiciajn sintenojn, helpo al virinoj akiri memfidon, kuraĝigo al ili aktive partopreni en difinita agado (en nia kazo, kompreneble, temas pri Esperanta agado).

En la dua tago oni diskutis la starigon de projektoj por realigi kelkajn el tiuj proponoj. La unua neceso estis

krei sistemon per kiu KVA povus plenumi siajn ideojn, ĉar evidente la tri membroj de la komisiono (Eliza Kehlet, Anna Brennan, Loes Demmendaal) ne povas mem ĉion fari. Tre grava decido, do, estis, ke KVA kontaktu aron da virinoj en kvardeko da landoj, por peti ilian kunlaboron. (Virinoj kiuj interesiĝus aldoniĝi al tiu listo, bonvolu kontakti KVA, p/a Nieuwe Binnenweg 197B, 3021 GA Rotterdam.)

Kaj pri precize kio KVA deziras ilian kunlaboron? Pri la pozitiva prezento de virinoj kaj la forigo de stereotipoj oni plej efike povas labori en nia movado pere de la Esperanto-gazetaro kaj lokaj grupoj. Do multaj el la ideoj koncernas provizadon de artikoloj kaj prelegoj. Tamen, por tio necesas trejnado, ĉar ne ĉiuj virinoj havas la necesan sperton por verki artikolojn aŭ publike paroli. Tial aliaj proponoj rilatas al trejnado de virinoj en tiuj kampoj.

Pliaj agadterenoj, pri kiuj KVA interesiĝas, estas la kontaktado kun aliaj virinaj organizaĵoj, esplorado pri eventuala diskriminacio en la sistemo de membreco en diversaj Esperanto-asocioj, kaj agado por la 8a de marto (Internacia Tago de la Virino). Kompreneble ĝi ankaŭ planas eldoni informilojn pri sia laboro, en naciaj lingvoj kaj en Esperanto.

Ĝenerale la partoprenantoj trovis la kunsidon tre utila kaj decidis organizi duan en Hamburgo por la venonta jaro. Espereble tiam estos eĉ pli por diskuti post jaro da laboro. En la sama jaro ekzistas ebleco organizi kunsidon inter patrinoj dum asembleo de infanoj en Bulgario.

A.B.



Anna Brennan (maldekstre) kaj Linnéa Edsenius komencis diskuti jam dum la 65a UK en Stokholmo. Ili ambaŭ venis al la roterdama renkontiĝo por daŭrigi la diskuton.

Nova organiza formulo por matematikistoj

ESTAS MALFACILE funkciigi malgrandan asocion, kiam la respondeculoj loĝas dise en la mondo kaj komunikas inter si nur skribe: leteroj bezonas longan tempon por vojaĝi, ĉiu kunaganto havas proprajn okupojn ekster la asocio, kaj ofte ne sukcesas tuj respondi al la leteroj; la atendado malpliigas la entuziasmon, ĉiu sentas sin pli-malpli kulpa pro la malvigleco de la asocio, kaj finfine oni atingas la demandon: ĉu ni laboras **por**, aŭ **per**, aŭ **pri** Esperanto, aŭ ĉu ni laboras **pro** Esperanto?

Unu el la solvoj al tiu problemo estas, ke la sama homo surpronu la plejmulton el la respondecoj en la asocio kaj garantiu sufiĉe rapidan reagon al ĉiu ricevita materialo, informpeto, letero ktp. Sed, kiu homo nuntempe kapablas tion fari, krom eventuale oficisto plentempe salajrata de la asocio? Kio okazos, se subite la respondeculo ne plu povas plenumi siajn taskojn aŭ, se la asocio kreskas kaj la ofico fariĝas tro peza por unu sola persono?

Alia solvo estas modifi la komunikan strukturon de la asocio, proksimigante la membrojn kaj, sekve, la respondeculojn (nunajn kaj eventualajn). Al tiu solvo celas Internacia Asocio de Esperantistaj Matematikistoj (IAdEM), de post sia konferenco en Budapeŝto. Tiu, kiu sentas sin izolita de la ceteraj aktivuloj, malpli emas labori por la asocio, kaj jen la plej verŝajna kialo de la neapero de *Matematiko translimen*, kies redaktoro, en Nov-Jorko, sentis sin tute for de la ceteraj asocioj.

Proksimigon oni atingu per du vojoj: plioftigo de la telefonaj kontaktoj, kaj organizo de veraj laborkonferencoj. La unuan tian konferencon IAdEM organizis en Budapeŝto, okaze de Vintra Esperantista Ferio (de la 29a de decembro 1980 ĝis la 2a de januaro 1981) laŭ invito de Komisiono de Hungara Esperanto-Asocio pri la Scienca kaj Faka Aplikado de Esperanto. Partoprenis dudeko da matematikistoj el ok landoj, plus dudeko da komputistoj, kiuj havis iom apartan programon. Okazis pluraj prelegoj, pri didaktiko de matematiko, pri nombro-teorio (interalie de prof. Hános Surányi, prezidanto de Hungara Asocio de Matematikistoj). Sed okazis krome laborkunvenoj por reorganizi la agadon de IAdEM: terminologie ni limiĝos provizore al aro-teorio kaj geometrio; du ĉapitroj de matematika lernolibro, jam tradukitaj en Soveta Unio, estos kontrolitaj en Francio kaj Italio kaj multobligitaj en Rumanio. Speciala numero de *Matematiko translimen* estos redaktita en Budapeŝto kaj enhavos raporton de la budapeŝta aranĝo kaj la tekston de tieaj prelegoj.

Multaj partoprenantoj akceptis en Budapeŝto precize difinitajn taskojn por la tuj venontaj monatoj, pri

solvado de problemoj aperintaj en *Matematiko translimen*, pri diverslanda didaktiko de matematiko. En marto aperos novaj cirkuleroj de IAdEM por informi la membrojn pri la laborplano kaj por respondi al informpetoj.

Nur post duonjaro ni povos bilanci la unuajn rezultojn de nia nova strategio, sed jam nun ni antaŭvidas novajn renkontiĝojn de IAdEM, por konservi kontakton inter la aktivuloj kaj regule ĝisdatigi la laborprogramon.

Pli precizajn informojn pri tiu laborprogramo vi povas peti de François Lo Jacomo, 14 rue de la Pompe, F-75016 Paris, Francio.

François Lo Jacomo

Kalendaro

Kie oni atendas vin

Tutjare

Kursoj de Internacia E-lernejo, Bydgoszcz, Pollando (Esperantotur, str. Skłodowskiej-Curie 10, PL 85-094 Bydgoszcz)
Kursoj, turismaj kaj kulturaj aranĝoj, Varna, Bulgario (Internacia E-kursejo, pk. 791, BG-1090 Sofia)

Marto

29-05/4 E-kunveno en Bahia, Ilhéus, Brazilo (E. L. de Sá, Caixa postal 72, BR-45660 Ilhéus)
29-05/4 Kultura aranĝo en Grésillon, Baugé, Francio (Esperantista Kulturdomo Grésillon, F-49150 Baugé)
30-03/4 Internacia E-renkontiĝo, Katowice, Pollando (PEA, str. Wolności 37, PL 41-500 Chorzów)
30-05/4 Kunveno de FFEA (fervojistoj), Troyes, Francio (FFEA, 1bis, rue d'Athènes, F-75009 Paris)
31 Kotizoj de la Universala Kongreso altiĝas
31 Limdato de la Belartaj Konkursoj

Aprilo

03-04 Kongreso de Dana E-Asocio, Fredericia, Danlando (DEA, Vindingsvej 5, Stensballe, DK-8700 Horsens)
03-05 4-ŝtupaj E-kursoj, Langen, FR Germanio (M. Führer, Am Stadtpfad 11, D-6236 Eschborn/Ts.)
03-05 20a Kongreso de PEA, Katowice, Pollando (PEA, str. Wolności 37, PL 41-500 Chorzów)
11-12 76a Kongreso de Skota Esperantista Federacio, Dumfries, Britio (T. Neil, 18 Glencaple Avenue, Dumfries, Skotlando DG1 4SJ)
16-21 5a Junulara Festivalo, Porretta Terme, Italio (IEJ, pf. 210, I-56100 Pisa)
17-19 5a Tendaro de HEJS, Elx, Hispanio (A. Verdú, c/ José Barnad Amors 38-3-1ª, Elx, Alicante)
18-20 36a Kongreso de SAT-Amikaro, St. Jorioz, Francio (SAT-Amikaro, 67 Avenue Gambetta, F-75020 Paris)
23-15/10 Regulaj vizitoj en Istanbul, Turkio (H. Dural, Saskinbakka/Akın Sokagi 12/2 D-7, Suadiye/Istanbul)
24-26 Nederlanda E-Kongreso, Oudleusen, Nederlando (NEK, Hoeveveg 18, 8394 VR De Hoeve)
25 Limdato por la Internacia Ekzameno
26-01/5 9a Studenta Interlingvistika Seminario, Pomiechówek, Pollando (Studenta Interlingvistika Rondo, ul. Krakowskie Przedmieście 24, PL 00-325 Warszawa)

Majo

01-03 59a Germana E-Kongreso, Westerland, FR Germanio (GEA, Lambertstr. 12, D-6430 Bad Hersfeld)

- 01-03 Trilanda renkontiĝo, Unterkirnach, FR Germanio (J. Schiffer, Fohrenweg 19, D-7731 Unterkirnach)
- 01-03 7a Renkontiĝo de E-junularo, Zenica, Jugoslavio (Esperanto, V. Pelagića 8/I, YU-71000 Sarajevo)
- 02-05 14a Kunloĝado de esperantistoj, Yaizu, Japanio (Edomo, Sone Bil. 502, 46-17, Yoyogi-3-tyōme, Sibuya-ku, Tōkyō, 151)
- 03-10 Ferio-semajno kaj seminario, St. Urban, Aŭstrio (M. Stuppnig, Esperantostr. 175, A-9601 Arnoldstein)
- 08-10 Studtagoj, As Vig, Danlando (L. Egholm, Vindingsvej 5, DK-8700 Horsens)
- 14-24 Turisma renkontiĝo, Velingrad, Bulgario (E-Societo, pk. 7, BG-4600 Velingrad)
- 15-21 33a Kongreso de IFEF, Regensburg, FR Germanio (IFEF-Kongreso, Wiener Strasse 121, D-6000 Frankfurt/Main 70)
- 22-25 65a Brita Kongreso de Esperanto, Harrogate, Britio (LKK, 3 Northdale Mount, Bradford BD5 9AP)
- 23-29 6a Ĉebalta E-Printempo, Mielno, Pollando (PEA, skrytka 30, PL 75-950 Koszalin)
- 23-02/6 3a Esperantista Turista Renkontiĝo, Velingrad, Bulgario (E-Societo, pk. 7, BG-4600 Velingrad)
- 29-02/6 Folkloro Renkontiĝo, Toruń, Pollando (PEA, str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL 85-094 Bydgoszcz)
- 30-06/6 Seminario de TEJO/KER, Strasbourg, Francio (E. Schwarzer, Luckauerstr. 6, D-1000 Berlin 61, Germanio)
- 31-07/6 Konferenco de Monda Turismo, Bydgoszcz, Pollando (PEA, str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL 85-094 Bydgoszcz)


Junio

- 02-07 6a E-Renkontiĝo, Bydgoszcz, Pollando (PEA, vd. ĉi-supre)
- 04-06 Junulara renkontiĝo, Szombathely, Hungario (JK de HEA, pf. 193, H-1368 Budapest)
- 05-08 Frenezaj Tagoj de Perpignan, Francio (JEFO, 4bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris)

- 22-28 Mezlerneja ripoztendaro, Balaton, Hungario (JK de HEA, Pf. 193, H-1368 Budapest)
- 26-28 23a Kongreso de Kanada E-Asocio, Montréal, Kanado (M. Labelle, 10617 Oscar, Montréal, Québec, H1H 5J8)
- 28-04/7 3a Kongreso de Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj, Ottawa, Kanado (R. Ogram, 100 Crerar Ave., Ottawa K1Z 7P2)
- 29-03/7 Somero de Jyväskylä, Finnlando (T. Tyynelä, Taidepolku 6 J, SF-40720 Jyväskylä)
- 29-17/7 Trinivela E-kursaro, San Francisco, Usono (ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530)

Julio

- Julio 14a Pionira tendaro, Zánka, Hungario (HEA, Pf. 2, H-7601 Pécs)
- 01-10 Internacia Junpionira Tendaro, Szentendre, Hungario (HEA, Somogyi-Bacsó part 17., H-2000 Szentendre)
- 01-12 Junulara E-feriado, Szczecin, Pollando ("Gromada", Pl. Lotników 7, PL 70-414 Szczecin)
- 01-01/8 Aŭtobusa vojaĝo tra Eŭropo (E-Centro Århus, Banegårdsgade 19, DK-8000 Århus, Danlando)
- 02-02/9 Kulturaj aranĝoj de Grésillon, Baugé, Francio (Esperantista Kulturdomo Grésillon, F-49150 Baugé)
- 03-12 Somera E-lernejo, Kotor Varoš, Jugoslavio (Esperanto, V. Pelagića 8/I, YU-71000 Sarajevo)
- 05-11 19a Somera E-Universitato, Gyula, Hungario (SEJ, 48-as u. 11, H-5700 Gyula)
- 05-19 5a sesio de Someraj Universitataj Kursoj, Liège, Belgio (SUK, Boîte Postale 9, B-Liège X)
- 05-15/8 Somera E-Tendaro, Lančov, Ĉeĥoslovakio (E-klubo, CS-674 01 Třebíč)
- 10-17 37a Internacia Junulara Kongreso, Oaxtepec, Meksikio (IJK, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando)
- 11-18 Esperantista feriosemajno, Immenstadt, FR Germanio (BEL, Seitzstr. 14, D-8900 Augsburg)



- 05-08 Komuna renkontiĝo de FLEJA/GEJ, Hoher Knull, FR Germanio (T. Bormann, Schärstr. 26, D-2050 Hamburg 80)
- 06-09 73a Franca E-Kongreso, Perpignan, Francio (Esperanto, 72 Ave. Général de Gaulle, F-66000 Perpignan)
- 06-13 Migradtagoj, Edlach-Reichenau, Aŭstrio (M. Finkenzeller, Troststr. 27/2, A-1100 Wien)
- 07-09 47a Norvega E-Kongreso, Oppdal, Norvegio (NEL, Boks 942 Sentrum, Oslo 1)
- 11-17 E-semajno en Laponio, Ylitornio, Finnlando (Internacia Studcentro, SF-17300 Vääksy)
- 13-16 Pupteatra Internacia Festivalo, Tromsø, Norvegio (IKS, Amruševa 5/I, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio)
- 16-30 Somera E-lernejo, Władysławowo, Pollando (PEA, str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL 85-094 Bydgoszcz)

- 11-21 Konferenco de ILEI, Gödöllő, Hungario (HEA, Pf. 193, H-1368 Budapest)
- 11-24 Somera E-lernejo, Dedinky-Mlynky, Ĉeĥoslovakio (E-klubo, Dom Umenia, CS-041 23 Košice)
- 13-31 2a Junulara E-laborbrigado, Białyostok, Pollando (PEA, skrytka 67, PL 15-950 Białyostok)
- 14-28 E-Ĵamboreo, Siewierz, Pollando (Komenda Hufca Beskidzkiego ZHP, str. Chopin 3, PL 43-300 Bielsko-Biała)
- 14-06/8 Junulara renkontiĝo, Balta Maro, Pollando (Junulara E-Grupo, pk. 80, PL 90-955 Łódź)
- 15-19 Medicina E-konferenco, Ruse, Bulgario (D-ro I. Ferenczy, Pf. 143, H-9002 Győr, Hungario)
- 16-26 ICEM-renkontiĝo, Vaison la Romaine, Francio (ICEM-Esperanto, Saint-Puy, F-32310 Valence/Baise)

- 16-30/8 Somera E-lernejo, Gdańsk, Pollando (PEA, str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL 85-094 Bydgoszcz)
- 17-21 29a Kongreso de ELNA, New York, Usono (ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530)
- 17-22 41a Hispana Kongreso de Esperanto, Murcia, Hispanio (Esperanto, Apartado de Correos 3074, Murcia)
- 17-30 Internacia infana E-vilaĝo, Funka, Pollando (PEA, str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL 85-094 Bydgoszcz)
- 18-24 Internacia Kultura Semajno, Stykkishólmur, Islando (IEA, Pósthólf 1081, Reykjavík)
- 20-29 14a Internacia Renkontiĝo Naturamika, Abaliget, Hungario (HEA, Pf. 2, H-7601 Pécs)
- 24-30 Slovaka Paradizo, Ĉeĥoslovakio (P. Pavúk, Konrádova 6/8, CS-052 01 Spišská Nová Ves)
- 25-01/8 66a Universala Kongreso de Esperanto, Brasília, Brazilo
- 25-01/8 Ekumena kongreso de IKUE kaj KELI, Zwolle, Nederlando (L. Hordijk, Van Hogendorpstraat 4, 3135 CD Vlaardingen)
- 27-09/8 Skolta tendaro, Graz, Aŭstrio (SEL, Postbus 433, 1500 EK Zaandam, Nederlando)
- 31-10/8 Renkontiĝo por E-parolantaj infanoj, Balatonfüred, Hungario (E. Csiszar, Kulich Gyula u.25.V.16, H-8100 Várpalota)

Aŭgusto

- Aŭgusto Skolta tendaro, Kurszwica, Pollando (P. Skrzypczak, ul. Grunwaldzka 35 B/4, PL 60-781 Poznań)
- 01-08 49a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj, Zagreb, Jugoslavio (Esperanto, Draškovićeve 80, YU-41000 Zagreb)
- 01-08 54a SAT-kongreso, Basel, Svislando (E. Döring, Pf. 225, CH-4003 Basel)
- 02-13 Somera E-lernejo, Eger, Hungario (Heves, Pf. 105, H-3301 Eger)
- 06-16 2a Studenta E-Renkontiĝo, Toruń, Pollando (SKNE, RU SZSP UMK, Moniuszki 16/20, PL 87-100 Toruń)
- 10-16 1-a Franc-germana Junulara E-Semajno, Dümmerlohausen, FR Germanio (U. Felhölder, Hiärm-Grupe-Str. 23, D-4500 Osnabrück)
- 13-16 13a Friska Lernejo de Esperanto, Makino, Japanio (KLEG, Sone Higasi 1-11-46-204, Toyonaka, Ōsaka, 561)
- 15-18 3a seminario pri Esperanto en scienco kaj tekniko, Žilina, Ĉeĥoslovakio (L. Hanzel, Hliny 406A, CS-010 01 Žilina)
- 15-23 3a Renkontiĝo de E-Familioj, Žilina, Ĉeĥoslovakio (E. Csiszar, Kulich Gy. u. 25.V.16, H-8100 Várpalota,

Hungario)

- 22-29 Familia Tendaro, Thomsdorf, GDR (W. Pfennig, Leibnizstr. 5/67, DDR-2000 Neubrandenburg)

Septembro

- Septembro 3a Internacia Seminario Orientalisma, Lublin, Pollando (Studenta E-Rondo, ZW SZSP, ul. I. Armii WP 5, PL 20-078 Lublin)
- 01-07 Internacia Turisma Semajno, Malto (J. Vella-Bondin, "La Espero", New Str. off Qormi Road, St. Venera)
- 04-06 Semajnfina aranĝo de SEJU, Enköping, Svedio (SEJU, Box 4009, S-122 04 Stockholm)
- 06-12 Feria restado, Maria Alm, Aŭstrio (M. Finkenzeller, Troststr. 27/2, A-1100 Wien)
- 06-12 Feria konferenco de Kvakera Esperantista Societo, Charbonnières, Francio (M. Davies, 69 Twemlow Parade, Morecambe, Britio LA3 2AL)
- 06-19 Ora Pola Aŭtuno, Międzygórze, Pollando (PEA, skrytka 16, PL 50-952 Wrocław)
- 14-26 Internacia E-feriado, Berlin, Germana DR (Kulturligo de GDR, Breite Str. 35-36, DDR-1020 Berlin)
- 15-20 Mediteraneaj tagoj, Sète, Francio (Esperanto, 5 rue Dr. Roux, F-34000 Montpellier)
- 17-29 Seminario kaj ferisemajno, Velingrad, Bulgario (E-Societo, pk. 7, BG-4600 Velingrad)
- 19-24 52a Kongreso de IEF, Roma, Italio (IEF, Via Villorosi 38, I-20143 Milano)
- 20-03/10 E-lernejo kun folkloraj renkontiĝoj, Istebna, Pollando (PEA, str. Wolności 37, PL 41-500 Chorzów)

Oktoebro


- 02-04 4-ŝtupaj E-kursoj, Langen, FR Germanio (M. Führer, Am Stadtpfad 11, D-6236 Eschborn/Ts.)
- 07-11 14a Pupteatra Internacia Festivalo, Zagreb, Jugoslavio (IKS, Amruševa 5/I, YU-41000 Zagreb)
- 10-11 Internacia E-renkontiĝo, Oberkirch, FR Germanio (F.W. Poppeck, Lohmühlweg 1, D-7602 Oberkirch)
- 11-18 Seminario por E-ĉiĉeronoj kaj -vojaĝgvidantoj, Szczecin, Pollando ("Gromada", Pl. Lotników 7, PL 70-414 Szczecin)
- 17-18 Aŭtunaj tagoj de EAF, Turku, Finnlando (S. Salmivaara, Puistokatu 15 b A 25, SF-20100 Turku)
- 18-25 7a Internacia Foiro de E-turismo, Warszawa, Pollando (PEA, str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz)
- 23-25 Trarigardo de artisma movado, Warszawa, Pollando (PEA, str. Jasna 6, PL 00-013 Warszawa)
- 24 Tago de Unuiĝintaj Nacioj
- 30-01/11 Junulara Renkontiĝo de FLEJA, Lichtaart, Belgio (FLEJA, Arsenaalstr. 5, B-2000 Antwerpen)

Novembro

- 05-09 3a Studenta Aŭtuna Forumo, Szeged, Hungario (SRES, Pf. 193, H-1368 Budapest)
- 12-15 Studenta E-Konferenco, Poznań, Pollando (Studenta E-klubo, ZW SZSP, Fredry 7, Poznań)
- 16-29 Studenta Seminario "Internacia lingva komunikado", Łódź, Pollando (Łódzka Studenta E-Komitato, ZŁ SZSP, ul. Piotrkowska 77, PL 90-420 Łódź)
- 20-22 4-ŝtupaj E-kursoj, Langen, FR Germanio (M. Führer, Am Stadtpfad 11, D-6236 Eschborn/Ts.)
- 27-29 Literatura Forumo, La Chaux-de-Fonds, Svislando (LF-Kooperativo, C.P. 417, CH-2301 La Chaux-de-Fonds)

Decembro

- 07-12 Tagoj de Malagasa Kulturo, Zagreb, Jugoslavio (IKS, Amruševa 5/I, YU-41000 Zagreb)
- 10 Tago de Homaj Rajtoj
- 15 Tago de la Esperanta Libro
- 15 Zamenhof-Tago (LLZ naskiĝis en 1859)
- 28-02/1 11a Vintra Esperantista Fero, Budapest, Hungario (HEA, Pf. 153, H-1443 Budapest)
- 29-02/1 Novjara Balo, Varna, Bulgario (Internacia E-kursejo, pk. 791, BG-1090 Sofia)




Ĉu nia komitatano L. Kosieniak (maldekstre) akuzas Andreon Grzębowski (ankaŭ komitatano de UEA) pri la amplekso de lia turisma agado en Pollando, kiu duobligis la necesan spacon de ĉi tiu rubriko? (Foto: Z. Nikolov)

Du valoraj helpiloj

Recenzas Charles R.L. Power (Nederlando):

Gvidlibro por supera ekzameno; Historio, literaturo, metodologio. Redaktis Alfonso Pechan (1902-). Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1979 (2a eld.). 370p. 18cm. ISBN 963 571 031 3.

Baza literatura krestomatio. Redaktis Vilmos Benczik (1945-). Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1979. 266p. 18cm. ISBN 963 571 044 5.



Kiam unue aperis *Gvidlibro por supera ekzameno* (du volumoj: 1964, 1966), ĝi kontentige plenumis iom urgajn bezonojn. La dua eldono plenigas, ĝenerale, la saman vakuon (mankas nur la gramatika demandaro), sed tiu — dank' al aliaj verkoj intertempe aperintaj, plej notinde *Esperanto en perspektivo* — ne plu estas tiel granda. Des pli akre, do, ni juĝu la novan eldonon de la *Gvidlibro*.

Ve, ĝi ne eltenas tiel kritikan ekzamenon. La tuto ankoraŭ bezonas redaktadon — por forigi erarojn, por rearanĝi emfazojn, por poluri la lingvaĵon. Por propagandemaj novicoj, danĝera estas libro, kiu faras la germanan oficiala lingvo de UN (p. 15); kiu asertas nude, sen ajna precizigo, ke "En Sovetunio la revolucia registaro decidis rekomendi adapton [tiel] kaj instruadon de E." (p. 59); kiu fanfaronas pri Unesko, ke "... en sia [tiel] oficiala organo ofte estis favoraj artikoloj kaj sciigoj pri la movado" (p. 68).

Oni povas kompreni, kial la frazo "De 1950 ĝis 1955 sekvis silento en la hungara Esperanto-movado" (p. 110) aperas sen plia klarigo. Malpli allasindaj estas partecaj kalumnioj kontraŭ SAT (ĉap. 23).

Pli sukcesas la sekcio pri la Esperanta literaturo.

Apenaŭ mankas nomo de aŭtoro, kiu grave influis (aŭ influas) nian literaturon, kvankam la donitaj informoj, pro la amplekso de la libro, ne povas esti multaj. Kelk-loke oni povas bedaŭri la mankon de kritikaj juĝoj,

ekz. pri la Ŝekspir-tradukoj de Andrew aŭ la esploroj de Holzhaus. La mortodato 1973 ĉe Miĥalski ŝajne estas preseraro origininta el lia malapero ĉ. 1937.

István Szerdahelyi kontribuas la sektion pri instru-metodologio. Denove, mankas adekvata redaktado. La aŭtoro ne sufiĉe diferencigas inter historia priskribo de fremdlingvaj instruteorioj kaj propraj opinio kaj praktiko. Aperas neklarigitaj neologismoj kaj strangaj mallongigoj. Kiel brazilano aŭ japano sukcesus diveni la signifon de "Sz/1/" aŭ "E/1" (kiuj miadivene celas la saman verkon, nome la lernolibron de Szerdahelyi, kies tria eldono aperis en 1972, sed kiu mankas en la ĉi-libra bibliografio)? Sed ne mankas praktikaj sugestoj eventuale utilaj por kursgvidontoj.

Baza literatura krestomatio estas kunmetita kiel akompano al la *Gvidlibro*. Kvindek ses verkistoj, de Zamenhof ĝis Valano, montras sepdekjaran evoluon de la Esperanta beleto. Rilate la prozaĵojn, oni povas bedaŭri la preskaŭ plenan mankon de noveloj favore al mallongaj romanfragmentoj, sed tio eble plej taŭge servas la kultur-unuecigan celon de la redaktoro. La elekto de poemoj, kiu eksplicite provas sekvi estiĝintajn normojn, estas aparte bonvena pro la plurjara nehavebleco de *Esperanta antologio*.

Originalaĵoj havas prioritaton, kvankam enestas kelkaj tradukaĵoj historie gravaj, ĉefe el la plej frua periodo — ĉiu sub la nomo de la tradukinto. (Estas interese kompari la esperantigojn, fare de Zamenhof en 1894 kaj Newell en 1960, de la hamleta monologo.) Kabe estas la sola, kiun prezentas nur tradukaĵo; mi iom domaĝas aliajn ĉi-kampajn eminentulojn (Bodó, Knoedt, Haugen, de Diego). Ankaŭ inter originalistoj eblas rimarki mankojn, ekz. Eroŝenko, Lanti, Gabrielli, Ueyama. ... Ĉio ĉi atestas simple, ke la kompilinto disponis ne dek volumojn sed nur unu. Similaj sekvu!

Mendu ĉe UEA: *Gvidlibro* 15,00 (por Nederlando 15,60); *Baza literatura krestomatio* 13,80 (por Nederlando 14,35) gld., plus sendokostoj 10%.

Inspira vivo

Recenzas W.A.M. van Heugten (Nederlando):

Janusz Korczak (1878?-1942), de Alicja Szlęzakowa. El la pola tr. Jerzy Uśpieński. Warszawa: Wydawnictwa Szkolne i Pedagogiczne, 1979. 143p. Ilus. 20cm. Bindita. ISBN 83 020 0011 6.

La Dua Mondmilito estis, por milionoj da homoj, ne nur terurega okazintaĵo, sed ĝi havis ankaŭ alian flankon, tro ofte forgesitan: tiun de paca helpemo, ekzempla amo al la proksimulo kaj korvarmiga idealismo. Ĉi tiu libro (kiu aspektas kiel bela albumo) montras per tekstoj kaj bildoj la vivon kaj morton de la pola idealisto unuaranga — Janusz Korczak. Lia tuta ekzistado staris sur tiu belega flanko de homamo kaj sindonemo.

Janusz Korczak — laŭ sia vera nomo Henryk Goldszmit — naskiĝis en 1878 (aŭ 1879) en Varsovio, en riĉa intelektula familio. Li perdis jam en sia junaĝo la

patron kaj devis poste vivi kaj studadi en tre malfacilaj cirkonstancoj. Korczak tamen sukcesis efektiviĝi sian idealon: helpi la edukadon de la malriĉa, helpbezona junularo. Li fariĝis ne nur eminenta pedagogo sed ankaŭ praktika fondanto de orfodomoj. Dum la milito li akompanis siajn georfojn en la morton. Unesko vicigis la centan datrevenon de la naskiĝo de Korczak en la Mondan Kalendaron de Datrevenoj.

Rava bildo de homo, kiun la infanoj ĉiam denove kaptis kaj entuziasmigis, pedagogo per lecionoj kaj ĉiutagaj faroj. Korczak estis ankaŭ grava verkisto kaj publicisto. Kelkaj poemoj, listo de lia verkaro kaj multaj notoj kompletigas ĉi tiun valoran biografion.

Mendu ĉe UEA: 18,00 (por Nederlando 18,72) gld., plus sendokostoj 10%.

Bakin kiel Baghy

Recenzas W. Krikke (Nederlando):

Aŭtuno en la printempo (1932), de Ba Jin (1904-). El la ĉina trad. Laŭlum. Beijing: El Popola Ĉinio, 1980. 13+97p. Ilus. de Yao Youxin. 21cm. 10-Es-1525.

Belaspekta libro. Verkis ĝin, inspirite de *Printempo en la aŭtuno* (1931) de Julio Baghy, la ĉina verkisto Ba Jin, antaŭ kvindek jaroj, en la ĉina lingvo. Pasintjare kaj Ba Jin (=Bakin), fama ĉina esperantisto, kaj la traduko de ĉi tiu libro aperis en la 65a Universala Kongreso en Stokholmo.

La rakonto estas amhistorio de du gejunuloj, delikate kaj romantike priskribita, kun tragika fino. Tiu fino volas klare pentri la malagraban influon de la pli aĝa generacio en la tiutempa Ĉinio, kiu ne kalkulis kun la korinklinoj de junaj homoj kaj tiel detruis homvivojn. La priskriboj de paroloj kaj agoj de tre sentemaj junaj homoj estas majstraj. Same bonaj estas la skizoj, per nur kelkaj frazoj, de la ĉirkaŭaĵoj. La stilo estas bona kaj la libro legiĝas agrable. Ĝenas nur kelkaj superfluaĵoj "modernaj" vortoj, ekz. *ascendi* kaj *descendi*. Ankaŭ la uzado de *tiom* estas plurfoje nekonsekvenca; ŝajne malfacila afero por multaj esperantistoj. Entute, tre rekomendinda literaturaĵo.

Mendu ĉe UEA: Bind. 13,50; broŝ. 10,80 (por Nederlando 14,04 kaj 11,23) gld., plus sendokostoj 10%.

Por poeziema leganto

Recenzas Boris Kolker (Soveta Unio):

Hieroglifo, de Julia Pióro (1902-). Antverpeno / La Laguna: TK / Stafeto, 1979. 96p. 21cm. Belliteratura Eldonserio 41. ISBN 90 6336 017 7.

Post la apero de *El tero kaj etero* (eld. J. Régulo en 1964), Michel Duc Goninaz skribis pri ĝi en ĉi tiu revuo jene: "Ŝajnas, ke Julio Pióro promesas pli, ol ŝi donas en tiu ĉi debuta volumo." Nun, post dek kvin jaroj, oni povus diri la samon pri *Hieroglifo*, la nova kolekto de noveloj de tiu aŭtoro.

En la 15 rakontoj de la libro preskaŭ forestas intrigo; malgraŭ tio kohereco ne perdiĝas. Kelkaj el ili estas legendoj, aliaj — kvazaŭ modernaj fabeloj kun fona meditado, kun mergiĝo en melankolion kaj ioman mistikismon. Vero, amo kaj bono — jen estas la idealoj de la aŭtorino, kiujn ŝi sugestas al la leganto. Konsiderante la malmultecon de nia prozo, la libro estas rekomendinda, precipe por poeziemaj legantoj.

Mendu ĉe UEA: 9,60 (por Nederlando 9,98) gld., plus sendokostoj 10%.

Laste aperis...

Ĉu li venis trakosme?, Johán Valano (ps. de C. Piron, 1931-). Antverpeno/La Laguna: TK/Stafeto, 1980. 144p. 21cm. ISBN 90 6336 019 3. Spionoj kaj murdoj kreas problemojn por detektivo Jano Karal de Sanktavallo en ĉi tiu originala krimromano, la tria en serio. Prezo: 24,60 gld.

Diccionario de bolsillo Esperanto-Español y Español-Esperanto (1967), J. Paluzie-Borrell. Barcelona: Editorial Ramón Sopena, 1980 (reviziita eld.). 383p. 14cm. ISBN 84 303 0147 X. Poŝvortaro kun 25 000 vortoj kaj konciza gramatiko. Prezo: 4,50 gld.

Malgranda pola-Esperanta kaj Esperanta-pola fervojista vortaro. Bydgoszcz: Pola Esperanto-Asocio, 1978. 12p. Mimeo. 20cm. Prezo: 2,40 gld.

Matematiko translimen (n-ro 5, "dispa numero"), Gerard Cool. Parizo: Internacia Asocio de Esperantistaj Matematikistoj, 1980. 40p. 21cm. 128 distraj problemoj, kun konsiloj laŭ ili taksii sian matematikan kapablon. Prezo: 4,80 gld.

Medunarodni jezik esperanto u škole, Smail Grbo. Sarajevo: La aŭtoro, 1980. 372p. Ilus. 20cm. Provo detale prezenti ĉiujn aspektojn de la lingvo kaj Movado, kun iom da gramatiko, historio, legaĵoj, raportoj pri instruado, renkontiĝoj, vojaĝoj, korespondado ktp. Prezo: 25,80 gld.

Mia kredo, Karl Marks (1818-1883) kaj Frederik Engels (1820-1895). Tr. Edward Ockey. Hastings: Esperanto Editions, 1980. Simpla enkonduko al la dialektika materiismo. Prezo: 2,70 gld.

Patriotismo kaj registaro / Al politikistoj / Ĥodinka / Ne mortigu!, Leo Tolstoj (1828-1910). El la rusa tr. diversaj. Laroque Timbaut: Laŭte!, 1981. 74p. Mimeo. 21cm. Tri eseoj kaj novelo de la granda pacifisma verkisto. Prezo: 3,60 gld.

Robaĵoj, La / The Rubáiyát, Omar Kajam (1040?-1123?). Laŭ la elpersigo (1859) de Edward Fitzgerald (1809-1883) trad., el la angla, William Auld (1924-). Glasgow: Eldonejo Kardo, 1980. 51p. Ilus. de Jean Bomford. 21cm. ISBN 0 905149 14 9. Paralele aperas la Esperantaj verskvaroj apud la 75 anglaj de la unua eldono de la traduko de Fitzgerald. Prezo: 16,50 gld.

Vivo estas tute alia, La. Kompilis F.W. Poppeck (1913-). Oberkirch: Esperanto-Informejo, 1980. 32p. 21cm. Aforismoj, sentencoj k.s. de famaj kaj nekonataj aŭtoroj. Bela grafika aranĝo. Prezo: 4,80 gld.

Werkboek bij "La komencanto", I. de Bruin-Kooij kaj A.J.F. de Wit. Vogelenzang: FLE, 1979. 48p. 21cm. Diversspecaj ekzercoj por la populara nederlanda lernolibro, kun i.a. tradukekzercoj, krucvortenigmoj, demandoj. Prezo: 3,60 gld.

Zakwoordenboekje Esperanto-nederlands nederlands-Esperanto, A. de Wit (1950-). Federatie van Esperanto-organisaties in Nederland, 1981. 94p. 17cm. Konciza dudirekta vortaro, kun notoj pri la gramatiko. Prezo: 4,50 gld.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, ne akceptas mendojn, kiuj ne atingas la minimuman mendosumon de 15,- guldenoj. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj. Tamen, la sumo de la sendokostoj estas minimume 3,- gld.

Ĉi tiun rubrikon redaktas: **IAN JACKSON**, p/a Esperanto-Centro, 140 Holland Park Ave., London, Britio, W11 4UF.

Kio pri interna agado?

FOJE OKAZAS, ke la materialoj por ĉi tiu rubriko malfruas. Tio estas okazo, ke ankaŭ ni aliaj, ekster TEJO, diru kelkajn vortojn pri la junularaj demandoj. Jen ili, kun provo iom kirli kaj provoki reagojn, tiel ke estonte ne manku tekstoj por la rubriko:

La ekstera agado de TEJO estas jam de multaj jaroj tute admirinda. Ĝi estas multflanka kaj intensa. Ĝi estas ankaŭ tre lerta, ĉar TEJO regule sukcesas gajni subvenciojn por siaj seminarioj, kiuj postlasas atentindan informan efekton. Fakte, oni povas aserti, ke UEA en la lastaj jaroj sukcesis iom lerni el la antaŭa aktiveco de TEJO sur la kampo de la eksteraj rilatoj. Do, ankaŭ UEA nun havas intensajn eksterajn rilatojn, kvankam ĝi ankoraŭ ne lernis de TEJO, kiel oni gajnas ekstermovadajn subvenciojn por la movada agado.

Sed, kio okazas pri la interna agado de TEJO? Atingis nin informoj, ke Dana Esperanto-Junularo definitive malfondiĝis, ke la madagaskara E-junularo fariĝis eĉ pli granda enigmo ol antaŭe, ke la nov-zelanda kaj norvega landaj sekcioj aŭ ĉesis ekzisti aŭ estas en granda krizo, ke Svisa Esperanto-Junularo ne plu estas inter la vivantoj, ke la japana junulara movado daŭre ne sukcesas lande organiziĝi, ke la Esperanta junularo silentas en Argentino kaj Greklando, ke ankoraŭ ne sukce-

sas kelkjaraj klopodoj revivigi la junularan sektion en Aŭstrio, ke Aŭstralio malaperas de la TEJO-mapo, ke la brazila kaj usona sekcioj disfalas/is, ke tutlanda junulara sekcio en Jugoslavio ekzistas nur surpapere. . .

Nu, estas iom normale, ke TEJO havas pli da problemoj kun siaj landaj sekcioj, ol havas UEA kun siaj naciaj organizaĵoj. Vi memoras, ke la junaĝo daŭras malpli longe ol la vivo. Tamen, eble io estas farebla pri ĉiuj ĉi problemoj en la junulara Esperanto-movado de la diversaj landoj. TEJO mem verŝajne povas ion fari post reekzameno de siaj prioritatoj. Tiu, kiu povus kaj devus fari pli ol TEJO ĉi-rilate, estas la landaj asocioj, ĉar la hodiaŭa krizo en la landaj sekcioj aŭguras morgaŭan krizon en la tuta Esperanto-movado de la koncerna lando. Pardonu, sed almenaŭ ni, neinformitaj kaj malproksimaj, ne sukcesas kompreni, kial ekz. la estraro de Svisa Esperanto-Junularo decidis malfondi tiun organizaĵon ĝuste nun, kiam ĝi ricevis aŭ povus ricevi konsiderindan monhelpon el la profito de la Universala Kongreso en Lucerno. Cetere, ĝuste en tiu Lucerno ŝajnas ekzisti, grandparte kiel postrezulto de tiu Kongreso, aktiva junulara grupo. Kial la landa sekcio ne povus translokiĝi al Lucerno anstataŭ estingiĝi?

Tra multaj jaroj, TEJO, samkiel ĝiaj landaj sekcioj, fleugas tute aparte altan nivelon, lingvan kaj teman, en sia laboro. Ĝi — simile al UEA tiukampe — preskaŭ plene malatentas la komencantojn kaj la instruadon de la lingvo ĝenerale. Organizaĵo, kiu pretendas daŭran regeneron de sia membraro, ne devus lasi la tutan zorgon pri la disvastigo de la lingvo — en la junularaj medioj — al la lokaj kluboj kaj la instruista faka organizaĵo. Jes, do, brave pri la ekstera, sed kio okazas pri la interna agado de TEJO?

sm

Akceptu la poleksan konsilon! Certiĝu, ke vi ricevos la revuon **KONTAKTO** en 1981. Vi jam iom malfruas! En la pasinta jaro **KONTAKTO** prezentiĝis i.a. per la numeroj pri komputiloj kaj alternativaj vivstiloj. Tiel diversas la temspektro de **KONTAKTO**. Diversas ankaŭ la verkantoj, sed ili ĉiuj junas, kaj iliaj ideoj odoras je freŝeco. Memoru, ke **KONTAKTO** estas Esperanta revuo pri kiu oni povas fieri ekstermovade!

Malpli ol 26-jara? Membriĝu nun en UEA/TEJO kaj vi ricevos la revuon **KONTAKTO** sen plia pago. Ne forgesu informi nin pri via naskiĝjaro!

Malpli ol 18-jara? Se vi unuafoje membriĝas en UEA/TEJO en 1981, ni bonvenigos vin per dujara membreco kontraŭ unujara kotizo.

Pli aĝa sed juna spirite? Presono de kiu ajn aĝo povas aboni kaj ĝui la revuon. Patronoj de TEJO ricevas ĝin aŭtomate. La plimulto de la kotizperantoj de UEA povas montri al vi specimenon de **KONTAKTO**. Ĉiu el ili akceptos vian membriĝon/abonon en via loka valuto.



Hinda Unio

- En la Universitato de Puneo (sud-oriente de Bombajo) d-ro Probal Daŝgupto instruas Esperanton al "taĉmento da interesitoj", kiel li mem skribis. La kurso okazas dufoje semajne.

Brazilo

- Unu el la radiostacioj de la brazila ĉefurbo – Brasília Super-Radio – ĉiusabate matene elsendas informojn kaj intervjuojn pri Esperanto kaj la 66a UK.
- Ĝojante pro nia januara kovrilbildo kaj la titolo "Brazilo kantas prepare al la 66a UK", la koncernuloj el Rio-de-Janeiro sendis al la LKK de la 66a UK la jenan telegramon: "Rio kantas prepare al la 66a. Kion faras Brasília?". La respondo tekstis: "Brasília laboras!"

Soveta Unio

- Pluraj eldonejoj anoncas novajn Esperanto-librojn ĉi-jare: "Eesti Raamat", la plej aktiva soveta eldonanto en la Internacia Lingvo, promesas du novajn estonajn beletraĵojn. Alia estona eldonejo, "Valgus" (Lumo), presas novan Esperanto-lernolibron. La estona edukministerio ĵus eldonis la libron de Johannes Palu *Fakultativa kurso de Esperanto por lernejoj*. En Tallinn

oni nun redaktas grandan Esperanto-estonan vortaron. La moskva eldonejo "Nauka" (Scienco) nun firme anoncas, ke la longe atendata lernolibro por ruslingvanoj, de Isajev kaj Semjonova, aperos ĉi-jare en 30 000 ekzempleroj. En 5 000 ekzempleroj aperos la ruslingva scienca verko *La lingvo Esperanto* de M.I. Isajev.

Tajlando

- En tiu azia lando apenaŭ ekzistis Esperanto-movado ĝis nun. Tamen, tra pluraj jaroj la franca pastro Perray klopodis diskonigi la lingvon. Helpis ankaŭ kontaktoj, kiujn pro siaj komercaj vojaĝoj tien havis s-ino Yukiko Isobe. Nun kreiĝis Tajlanda Esperanto-Instituto (G.P.O. Box 983, Bangkok) kies prezidanto estas s-ro S. Kulimekin.

Svedio

- De la 6a ĝis la 8a de junio, Sveda Esperanto-Federacio kaj Klubo Esperantista de Malmö kune festos siajn respektivajn 75-jarajn jubileojn en Malmö. Honore al la evento baptiĝos samurbe la unua Esperanto-strato en Svedio, kaj dum la tri tagoj estos uzata speciala poŝta stampo. Cetere, ĵus eldoniĝis en Malmö bela, bunta kaj grandformata 20-paĝa turisma broŝuro en Esperanto. Multaj koloraj fotoj kaj konciza, informriĉa teksto pri la diversaj aspektoj

EĈ SURVOJE VI POVAS FARI ION MOVADE UTILAN!

Se vi intencas vojaĝi al Afriko, Azio aŭ Latinameriko. . . Esperantistoj kiuj pro ferioj aŭ pro profesio vojaĝas al landoj en tiuj mondpartoj, povas tre utili al la Movado. Se vi planas tian vojaĝon, vi povus antaŭe kontakti la Centran Oficejon de UEA por havi adresojn de izolitaj esperantistoj en la vizitotaj landoj. La funkciuloj de UEA, kiuj prizorgas la kontaktojn kun tiuj esperantistoj en Afriko, Latinameriko kaj Azio, en la kadro de la t.n. Regiona Agado, volonte korespondos kun vi por informi vin pri via ebla tasko kaj konsili kiel vi povos esti utila por Esperanto dum via vojaĝo.

de la malnova kaj moderna Malmö faras el ĉi tiu eldonaĵo la plej belan Esperantan urbo-gvidilon eldonitan dum la lastaj jaroj. Petu ĝin ĉe: Turistbyrå, Hamng. 1, S-211 22 Malmö.

Belgio

- Flandroj en la lastaj jaroj montriĝas la plej seriozaj celebrantoj de la Semajno de Internacia Amikeco. Ĉi-jare aperis, lige al tio, bone presita 24-paĝa broŝuro, de kiu proksimume duono konsistas el pagitaj anoncoj, ĉefe de lokaj neesperantistaj entreprenoj. Festa programo okazis, kiel jam kutime, en la urbodomo de la nordbelga urbo Kalmthout, sabate, la 28an de februaro.



- Gvatemalo: Tiu amerika lando nun apenaŭ aŭdiĝas en la Esperanto-movado. Iam, tamen, en la unuaj jardekoj de ĉi tiu jarcento, el tiu lando venis eĉ gazeto "Centrameriko esperantista". Antaŭ dudeko da jaroj UEA havis tie almenaŭ dekon da membroj. Nun, fine, aliĝis nova kaj sola membro tie, kvankam en la Jarlibro jam de kelkaj jaroj aperas adreso sub la nomo de Gvatemala Esperanto-Asocio. Des pli interese, ke la supra bildstrio aperis la 6an de februaro en la gvatemala ĵurnalo "La Nación". La dialogo tradukiĝas jene: "Ĉi tie oni parolas pri Esperanto. Kio tondre estas tio?" "Ĝi estas universala lingvo." "Ah, BANG?" Temas pri la bildstria rubriko "Mafalda", desegnita de argentinano, laŭ klarigo de nia sola leganto en Gvatemalo. Ĉio kune ŝajnas esti trafa informo pri la Internacia Lingvo, eĉ kun tiu malfacile digestebla "bang?" en la fino.

Informadiko

- Fine de 1980 en Budapeŝto fondiĝis Internacia Grupo Informosciencia (IGI). La prezidanto de la nova faka Esperanto-organizaĵo fariĝis prof. d-ro Wolfgang Schmid (Flensburger Str. 22, D-2392 Glücksburg, FR Germanio), dum la sekretariajn taskojn plenumos d-ro inĝ. Peter Broczkó (P.f. 193, H-1368 Budapeŝto). Fakaj kontaktoj bonvenas.

Konkursoj

- Internaciaj Floraj Ludoj, konata literatura konkurso, kiun antaŭ kelkaj jaroj revivigis esperantistoj en Katalunio, okazos ĉi-jare por la 20a fojo. Oni povas konkursi per originalaj poemoj (maksimume 100 versoj), prozo (2500 vortoj) kaj per tradukoj el la kataluna literaturo. La limdato estas la 10a de julio ĉi-jare. Pliajn informojn petu ĉe la sekretario: Gabriel Mora i Arana, Carrió 5-4, Manresa (Bages), Hispanio.

Eldonaĵoj

- Lastatempe aperis la kvina numero de la neregula beletra revuo *Horizonto de soveta Litovio* (3,00 gld.), unuafoje kiel eldonaĵo de la litova filio de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj. Kiel antaŭe, la enhavo de la 48-paĝa kajero estas riĉa kaj varia, kun artikoloj pri la historio de Litovio, noveloj, fabeloj, kantoj kaj poemoj.

Sciencfikcio

- Antaŭ nelonge grandan intereson vekis ekspozicio pri Esperanto ĉe la sciencfikcia kongreso "OctoCon" en Santa Rosa (Kalifornio, Usono). La prizorgintoj, Don Harlow kaj Mary Catherine Sears, intencas fari simile ĉe la pli ampleksa samtema kongreso "WesterCon" en Sacramento en julio ĉi-jare.

Interpretado

- En la konata usona ĵurnalo *The Wall Street Journal* (numero de la 12a de januaro 1981) aperis ampleksa artikolo pri la teknikaj problemoj, kiuj rezultas el la aliĝo de Greklando al la Eŭropa Ekonomia Komunumo. R. van Hoof, estrino de la interpretista servo, maltrankvile anticipas la

neceson por "relaksa" interpretado, el ekz. la greka en la danan pere de tria lingvo, sistemo, kiu plimultigas la eblecojn por eraroj. EEK nun havas pli ol tricent salajratajn interpretistojn, do pli ol havas UN kune

en Nov-Jorko kaj Ĝenevo — kaj je iuj okazoj ĝi devas kromdungi pliajn ducent.

Informado

- La ĵus aperinta n-ro 90 de la itala anarkiista revuo *A* enhavas sespaĝan sekcion pri la Internacia Lingvo, inkluzive de konciza gramatiko. La sekcion prizorgis s-roj F. Melandri kaj L. Tadolini.

Persone

Régulo

- Prof. d-ro Juan Régulo Pérez, fondinto de la renoma eldonejo Stafeto, en decembro elektiĝis, unuaniĝe, kiel membro-korespondanto de la Akademio pri la Hispana Historio. Prof. Régulo estas kandidato ankaŭ por la membreco en la Akademio pri la Hispana Lingvo.

Ragnarsson

- Vicprezidanto de UEA kaj estrano pri kulturo, Baldur Ragnarsson, konata Esperanto-poeto kaj akademiano, vizitos Japanion en aprilo ĉi-jare. Japana Esperanto-Instituto, kiu prizorgas la Esperantan parton de tiu vizito, antaŭvidis gazetaran intervjuon, seminarion kaj prelegojn en pluraj japanaj urboj.

Jung

- La honora membro de UEA Teo Jung, kies 88-jariĝon ni menciis en nia numero de novembro 1980, staras nun antaŭ alia vivjubileo: la 14an de aprilo ĉi-jare estos 50 jaroj de lia geedziĝo kun Agnes Jung, kiu kompreneble mem estas esperantistino, multe subteninta la edzon tra liaj multaj jardekoj en la Esperantomovado.

Szabó-Felső

- La ĝenerala sekretario de UEA, d-rino Flóra Szabó-Felső, faris en februaro trisemajnan vojaĝon tra Ĉinio, laŭ invito de Ĉina Esperanto-Ligo. D-rino Szabó-Felső pasis survoje ankaŭ tra Mongolio kaj klopodis kontakti tieajn esperantistojn.



- Johano Vilkki el Finnlando (meze sur la bildo) eniras nian rubrikon pri la movada "jet-elito", ĉar li en decembro prelegis en Venezuelo pri Papua Nov-Gvineo. Vi devas konsenti, ke ne estas tiel ĉiutaga afero, ke iu venas de la norda parto de la orienta hemisfero, iras al la sudo por preskaŭ tuŝi la internacian dato-limon, revenas al la eŭropa nordo, por poste prelegi en Sud-Ameriko!

OFICEJON EN LONDONO — NI NE HAVAS!

Sur la kovertoj en kiuj ni ekspedas la revuon aperas resendadreso en Londono. Tiu adreso apartenas al la eksped-kompanio, kiu traktas nian revuon, kaj ĝi aperas devige sur la kovertoj. Tien reiras nelivereblaj gazetoj, kaj la ekspedo-kompanio ilin resendas al ni. Se vi volas informi nin pri adresŝanĝo aŭ aliteme skribi al ni, **bonvolu ne uzi tiun londonan adreson**, sed la konatan en Roterdamo: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Dankon!

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Finnlando: Ulla Levo. Nederlando: D. Krombeen.

SOCIETO ZAMENHOF 1981

BELG: 116 Elfriede Ernst; 117 s-ino Van Ginderen-Martens; 118 Germaine Wolff. BRAZ: 119 Francisco Souza Almada; 120 Marija Pozder Almada; 121 Elvira Fontes. BRIT:

122 Geoffrey H. Sutton. FRANC: 123 Jean Paul Beau. FR GERM: 124 Elise J.F. Woller. ITAL: 125 Adelaide Casetta. JAP: 126 Toyozo Nisikawa. NED: 127 Willem H. Mook; 128 C. Mook-van der Laan; 129 Jaap S. Rooke. NORV: 130 Pepita de Caspary; 131 Margrete Landmark. SVED: 132 Åke Blomberg; 133 Jim Hornö; 134 M. Barbro S. Karlsson; 135 Bror Lindström.

DONACIOJ 1981 (gld.) ĝis la 31a de januaro

ASOCIA KAPITALO: Nederlando: Heredaĵo C. Pot 4 040,00.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Skotlando: Kalgako 10,32. Diversaj malgrandaj 8,40. Sumo ĉi-jara 18,72.

FONDAĴO CANUTO: Argentino: A. Lopez-Luna 55,00. Francio: F. Trepier 14,10. FR Germanio: A. Garcia 82,61. Kanado: C. Eatock 68,22. Nederlando: A.J. Middelkoop 250,00; F. Zeiler 62,50. Norvegio: I. Richard 16,73. Svedio: E. Brenander 75,67. Svislando: N. Weiss

72,06. Diversaj malgrandaj 6,52. NN 100,00; NN 62,50. Sumo ĉi-jara 865,91.

FONDAĴO OFICEJA ILARO: NN 1 000,00.

ĜENERALA KASO: Aŭstralio: K. R. Schwerin 2 500,00. Belgio: G. Wolff 1 000,00. Finnlando: A. Linja 27,12. Nederlando: R. Bossong 18,00; J.Th. de Goeij 300,00; E.S. Otto 62,00; Y. Weidema 17,50. Nov-Zelando: J. Wilson 84,00. Diversaj malgrandaj 5,87. NN 32,94. Sumo ĉi-jara 4 047,43.

PATRONOJ DE TEJO: 1 J. Wilson, Nov-Zelando. 2 S. MacGill, Nederlando. 3 L. Anjer, Norvegio. 4 M. Meywes, Nederlando. 5 A. Eder, FR Germanio. 6 F-ino Ogawa, Japanio. 7 G. Silber, Svislando. 8 B. Išizaki, Japanio. 9 P. Zlatnar, Jugoslavio. 10 M. Jullien, Francio. 11 M.A. Antuna Aspiazu, Hispanio. 12 Y. Nagase, Japanio. 13 G. Becker, FR Germanio. 14 J.S. Douma, Nederlando. 15 E.L. Parson, Britio. 16 M. Scherm, FR Germanio. 17 C.Ch.M. Tan, Nederlando. 18 F. Swift, Nov-Zelando. FONDAĴO AGADO ĈE UN KAJ UNESKO: Aŭstralio: K.R. Schwerin 2 500,00. Japanio: H. Kodama 54,44. Sumo ĉi-jara 2 554,44.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

Nekrologoj

LUDMILA JEVSEJEVA (1913-1980) forpasis la 28an de januaro en Rigo (Latvio, Soveta Unio). Konata kiel poeto kaj aktivulo, ŝi aperigis verkojn siatempe en *Literatura mondo* kaj *La suda stelo* kaj ankaŭ kontribuis al la rara poemvolumo *Naŭ poetoj* (1938). Dum la lastaj jaroj, porinfanaj versaĵoj ŝiaj aperis en *Heroldo de Esperanto*.

KONSTANTIN MIĤAJLOVIĈ GUSEV mortis la 9an de novembro 1980. Li estis poeto konata ĉefe pro siaj tradukoj. Elstaras lia traduko el la rusa de la longa poemo *Bone!* de V. Majakovskij, aperinta en 1967. Rimarkinda estas ankaŭ lia pionira elhispanigo de poemoj de Federico García Lorca, *Liriko*, 1968. Gusev staris malantaŭ granda parto de la moskva eldonagado de la lastaj du jardekoj, inkluzive de la neregula antologia kajero *Por la paco*. Multaj

el liaj tradukaĵoj, de i.a. Majakovskij kaj Jevtuŝenko, kaj cetere el pluraj lingvoj krom la rusa, atendas eldonon.

ALEKSANDRO LOGVIN (1903-1980) forpasis meze de julio 1980 en Moskvo. Naskiĝinte en Ukrainio, li esperantistiĝis en 1923, kaj aperigadis poemojn en *Heroldo de Esperanto* sub la plumnomo Liljer dum la tridekaj jaroj. Li poste perdis kontakton kun la Movado, sed reeniris ĝin en 1959, kaj en 1964 aperis lia poemaro *Sur la vivovojo* ĉe Stafeto. Liaj poemoj lastatempe aperis en *Paco* kaj *Der Esperantist*.

JANET ENGHARDT (1931-1981), usonanino vivinta en Svedio, subite forpasis la 14an de februaro en Stokholmo. Ŝi partoprenis kelkajn Universalajn Kongresojn kaj kiel talenta kantistino prezentiĝis en



pluraj Esperanto-kunvenoj. Ŝi estis reprezentanto de Universala Medicina Esperanto-Asocio por Svedio.

GEORGES SALAN, verkinto de *La nuda vero; Originala raporto pri propraj travivaĵoj en naziaj koncentrejoj 1944-1945* (1975), forpasis la 5an de februaro 1981. Li lernis Esperanton en 1923 kaj aktivis en proletaj E-rondoj dum jardeko, sed poste forlasis la Movadon, por reveni al ĝi en 1973.

La membraro de UEA en 1980

Lando	AM	IM	Sume
Afganio	-	1	1
Albanio	-	1	1
Alĝerio	-	1	1
Antiloj nederl.	-	1	1
Argentino	303	134	437
Aŭstralio	130	117	247
Aŭstrio	325	67	392
Bangladeŝo	-	1	1
Belgio	1024	205	1229
Bolivio	-	1	1
Brazilo	390	432	822
Britio	856	338	1194
Bulgario	4100	96	4196
Ĉeĥoslovakio	2003	130	2133
Ĉilio	39	17	56
Ĉinio	1124	18	1142
Danlando	335	117	452
Ebura Bordo	-	1	1
Egiptio	-	2	2
Ekvadoro	-	2	2
Etiopio	-	1	1
Filipinoj	-	2	2
Finnlando	470	249	719
Francio	614	565	1179
Germana DR	680	32	712
Germanio, FR	996	489	1485
Greklando	400	21	421
Gvatemalo	-	1	1
Hinda Unio	-	15	15
Hispanio	380	170	550
Hongkongo	-	5	5
Hungario	3055	190	3245
Indonezio	-	3	3
Irako	-	2	2
Irano	-	23	23
Irlando	25	9	34
Islando	15	43	58
Israelo	152	56	208
Italio	1450	249	1699
Jamaiko	-	1	1
Japanio	1099	359	1458
Jemeno	-	1	1
Jordanio	-	1	1
Jugoslavio	100	175	275
Kamerunio	-	1	1
Kanado	190	82	272
Kenjo	-	2	2
Kolombio	-	27	27
Korea Resp.	259	34	293
Kostariko	-	3	3
Kubo	-	7	7
Libano	-	1	1
Liberio	-	1	1
Luksemburgo	90	12	102
Madagaskaro	-	2	2
Malajzio	-	1	1

Lando	AM	IM	Sume
Malavio	-	1	1
Malto	30	1	31
Maroko	-	2	2
Martiniko	-	1	1
Maŭricio	-	1	1
Meksikio	22	20	42
Monako	-	1	1
Mongolio	-	2	2
Nederlando	407	434	841
Nepalo	-	1	1
Nigerio	-	2	2
Nikaragvo	-	1	1
Norvegio	344	97	441
Nov-Kaledonio	-	1	1
Nov-Zelando	123	65	188
Pakistano	-	4	4
Panamo	-	1	1
Peruo	16	3	19
Pollando	4150	124	4274
Portoriko	-	1	1
Portugalio	166	27	193
Rumanio	-	40	40
Salvadoro	-	1	1
San-Marino	-	1	1
Saudi-Arabio	-	1	1
Senegalio	-	2	2
Singapuro	-	2	2
Sirio	-	1	1
Soveta Unio	-	87	87
Sri-Lanko	-	4	4
Sud-Afriko	42	18	60
Sudano	-	1	1
Svazilando	-	1	1
Svedio	1100	498	1598
Svislando	185	179	364
Tajlando	-	5	5
Tunizio	-	2	2
Turkio	-	1	1
Urugvajo	-	4	4
Usono	307	450	757
Vatikano	-	1	1
Venezuelo	33	16	49
Vjetnamio	-	3	3
Zairio	25	4	29
100 landoj	27554	6629	34183

LAŬKATEGORIA RESUMO DE LA MEMBROSTATISTIKO DE UEA POR 1979 KAJ 1980

Kategorio	1979	1980
Membro-Jarlibro	1038	1133
Membro-Abonanto	3939	4133
Dumviva Membro	983	987
Honora Membro	18	21
Juna M-Jarlibro	123	134
Juna M-Abonanto	176	221
Individuaj Membroj	6277	6629
Asociaj Membroj	17908	20490
Junaj As. Membroj	6625	7064
Membroj entute	30810	34183
Societo Zamenhof	226	226
Abonoj <i>Esperanto</i>	232	273
Kolektivaj abonoj <i>Eo</i>	2178	2213
Abonoj <i>Kontakto</i>	226	232
Kolektivaj abonoj <i>Kto</i>	150	50
Kotizoj entute	33822	37177

RIMARKOJ KAJ KLARIGOJ

La ĉi-supra statistika resumo enhavas almenaŭ du atentindajn rekordojn: UEA neniam en sia historio atingis tiel altan sumon de la membroj (asociaj kaj individuaj kune); ĉar tio ŝuldiĝas unuavice al la nombro de la asociaj membroj, kompreneble, ankaŭ ĝi estas rekorda. Ĉio ĉi estas ligita al la daŭra kresko de la nombro de la landaj asocioj aliĝintaj al UEA. En 1980, Ĉinio aliĝis kaj portis al UEA pli ol mil asociajn membrojn. Tamen, ankaŭ la individua membraro kreskis pasintjare je 352, kompare kun 1979. Tio estas la plej alta nombro de pluraj lastaj jaroj. Ĝin oni i.a. dankas al la kreskoj en Argentino, Brazilo, Hispanio, Hungario, Irano, Svedio kaj Usono.

Rekorda membronombro

Ĉiuj medaloj (kaj rekordoj) havas ankaŭ la duan flankon. Tiel estas ankaŭ pri la pasintjara rekorda membronombro en UEA. Memoru, ke la plej granda kontribuo al la malperdo de la membraro en UEA estas Fondaĵo Canuto kaj Fondaĵo Azio-Afriko. Helpu al la du fondaĵoj, kiuj garantias la universalecon de UEA!

ekzameno



Redaktas: B. Golden,
Csikász u. 11.III.3
H-8200 Veszprém, Hung.

RESPONDO 40

(pri la demando vidu nian numeron de februaro)

a. La inventisto Iano Makenzo el Kolorado, Usono, konstruis spacŝipon por vojaĝo al Marso, kun kies loĝantoj li jam havis kontakton per lumondoj. Akompanas la inventiston dum la interplaneda vojaĝo Vilhelmo Vilki Vilson, ĵurnalisto. Iliaj aventuroj sur la ruĝa planedo estas rakontitaj de la usona esperantisto James Sayers en la romano *Invito al ĉielo* (1949).

b. "La verda raketo" estas unu el la noveloj en la samnoma novelaro verkita de Jean Forge — pseŭdonimo de la pola verkisto Jan Fethke (1903-1980) — kaj eldonita en 1973. La celo de la verda raketo estas la planedo Pax en sunsistemo B, kiu estis koloniita fare de esperantistoj de la Internacia Verdstelana Asocio.

c. "La Kosmoŝipo 'Edeno N-ro 5'" aperas en la kolekto de sciencfikciaj noveloj *Vage tra la dimensioj* de la japana aŭtoro Gaku Konisi. Lanĉite en la jaro 2015, la kosmoŝipo "Edeno N-ro 5" portas du androidojn, sintezitajn viron kaj virinon, kies tasko estas roli kiel Adamo kaj Eva kaj starigi la homan vivon sur alia planedo.

DEMANDO 41

(la respondo aperos en nia aprila numero)

Okaze de la 66a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos ĉi-jare en Brazilio, la ĉefurbo de Brazilo, pluraj artikoloj informantaj pri tiu vasta sudamerika lando jam aperis en Esperantaj periodaĵoj. Ankaŭ la historio de la disvastiĝo de Esperanto en Brazilo havas tre interesajn aspektojn. Kiom vi scias pri ĝi? Eĉ se vi ne sukcesos respondi ĉiujn dek demandojn, kiuj sekvas, espereble ili vekos vian scivolon pri la brazila

Esperanto-movadokaj ĝiaj kulturaj kontribuadoj.

a. Kiu estis la unua esperantisto en Brazilo? (Li estis eŭropano.)

b. Kiu estis la dua esperantisto en Brazilo? (Ankaŭ li estis eŭropano.)

c. Kiu estis la tria esperantisto en Brazilo? (Li estis brazilano.)

ĉ. Kiu grava evento rilatanta al la telekomunikado en Brazilo okazis en 1906?

d. En 1949, okaze de la centjara datreveno de la naskiĝo de elstara brazila politikisto, estis publikigita en Rio-de-Janeiro lia biografio verkita de Fernando Nery kaj esperantigita de Jozefo Joels. Pri kiu temas tiu verko?

e. La Ministerio de Edukado kaj Kulturo eldonis en Esperanta tradu-

ko versojn de brazila romantika poeto de la 19a jc. Pro sia simpatio al la aboliciismo, li estis nomata "la poeto de la sklavoj". Kiu li estis, kaj kiu elportugaligis liajn poemojn?

f. Klasikaĵo de la 19a-jarcenta brazila romantikismo estas "indianisma" romano pri la amo inter bela indianino kaj la portugala soldato Martim. Kiu estas la indiana virino, kiu donas sian nomon al la romano? Kiu estas la aŭtoro, kaj kiu esperantigis lian verkon?

g. Kio estas la brazila komunumo "Bona Espero"?


ĝ. Kio okazis en la brazila urbo Marília en julio 1978?

h. Al kiu religia movado en Brazilo apartenas du eldonejoj, kiuj jam publikigis multajn librojn en Esperanto?

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,85 guldenon (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj mem, kiuj bonvolu memori, ke rabaton por sinsekvaj ripetoj ni donas nur al enkadrigitaj anoncoj, kiel tiuj sur la kontraŭa paĝo, sed ne al anoncetoj.

Ŝparu ĉe UEA! La unuaj membroj, kiuj faris fiksdajn mondeponojn ĉe UEA, jam ricevis la 6-procentan renton por la unua duonjaro. Ankaŭ via mono povas doni al vi renton de 6% en guldenoj. Samtempe vi helpas la Asocion. Petu la regularon ĉe la Centra Oficejo, por informiĝi detale.



8-jara knabo deziras korespondi. Intereso estas artaĵoj, inventaĵoj, baletoj, violonado, scienco, matematiko, biciklado, skiado. Kim Jones, 452 Aldine - Apt. 501, Chicago IL 60657, Usono

Ĉe-kursoj necesas! Kurso tuj paroliĝa: *Esperanto laŭ la patrina metodo*. 320 paĝoj, DM 50,00. La kursokonversacio nur en Esperanto. August Weide, Nordalbingerweg 65, D-2000 Hamburg 61. Poŝtĉekkonto Hamburg 150 58-209.

25-jara mekanikingeniero volas korespondi kaj interŝanĝi bk. pri kulturo, etnografio, geografio kaj vojaĝoj. Stanisław Popis, ul. Makowska 8, PL-26-604 Radom, Pollando.

NIFO(UFO)-problemoj: Kiu serioze, science interesiĝas, bonvolu skribi al s-ro I.R. Trigulov, ul. Richard Zorge 107 kv. 103, SU-420110 Kazan, Soveta Unio.

Gejoj! Aliĝu al Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj. Informcele sendu i.r.k. al Peter Danning, 44 Morley Road, Twickenham, Britio, TW1 2HF. Konfidenco respektota.

Volas korespondi pri internacia pacdevigo. John C. Lincoln, 3320 East Weldon, Phoenix AZ 85018, Usono.

Engex Youth International Ltd. ofertas dum 1981 en Sud-Orienta Anglujo kursojn por lernejoj pri la angla lingvo. Loĝado ĉe anglaj familioj, sperta instruado, ekskursoj. Por grupoj de 16 aŭ pli, 3-semajna kurso kostas 180 pundojn por ĉiu persono. Skribu per adreso: Language Services, 17 High Street, St. Peter's, Broadstairs, Kent, Anglujo.

ESPERANTO-OAZO: kampadejo por ferii kaj samtempe praktiki nian lingvon

La E-O situas en hispana oranĝregiono, 10km for de la bona strando ĉe Gandía (Valencio). Ekzistas naĝejo, sportejo por ludi flugpilkon kaj duŝoj kun varma akvo el sunenergio. Estas planite aĉeti ruldomojn por luigi ilin dum la vintro. La mastro bezonas kaj deziras gekunlaborantojn, kun aŭ sen mono: precipe ĝardenist(in)on, aŭ similan, por ke la E-O estu ne nur lingva sed ankaŭ bela natura hejmo. Informas: Akiles Sanz, Apartado 171, Gandía (Valencia), Hispanio.

Almanako Lorenz

1981

Kun informoj pri spiritismo kaj spiritecaj temoj. Mendebla ĉe UEA aŭ vialanda libro-servo, 212-paĝa, prezo 10,00 gld. Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz, Caixa Postal 3133, BR-20000 Rio de Janeiro (RJ), Brazilo.

Ekkonu la heroan laboron de niaj pioniroj per tiu ĉi informriĉa kaj bela libro!

604p., 24cm., plaste bindita. Prezo: 45,— gld. Mendu ĉe UEA aŭ rekte ĉe Hungara Esperanto-Asocio!



INTERESAJN LEGINDAJN broŝuretojn eldonis

KVAKERA ESPERANTISTA SOCIETO

Aktualaj pensoj por nuna mondo. Ĉiu verkisto esprimas personan sperton kaj kredon por la vivo.

Mi afrikaniĝis. H.W. van de Merwe. 21 pencoj.

Monda krizo de vidpunkto religia. H. Brückner. 21 pencoj.

Notoj survoje. Damaris Parker Rhodes. 28 pencoj.

Mia spirita pilgrimado. Niranjana Nath Kaul. 30 pencoj.

La lasta estas tute nova. Mi sendos la kvar (inkl. sendokoston) por £1, aŭ egalvaloro, aŭ 7 int. rpk. (20 entute nur £4). Sendu nun al A.J. Leather, 19 Birch Drive, Silverdale, Carnforth, Britujo, LA5 0SE. Ĝirkonto 69 624 9308 (A.J. Leather).

Savu nin

per starigo de la
SUPERDEMOKRATA MONDORGANIZO!

♦ Esp/49


Ĉiuj vivantaj estaĵoj estas devigitaj de la naturleĝoj al ĉiutaga murdado, aŭ almenaŭ al ĉiutaga suferigo de diversaj aliaj estaĵoj, por ne mem morti la postan tagon. Mikroboj, fungoj kaj kuloj pro tio suferigas la homojn, hundojn kaj kokojn. Aglo murdas birdetojn; fiŝego fiŝetojn. Arbo sufokas sube kreskantajn herbojn. Homo manĝas kokidojn, ovojn, salaton, fruktojn, kies vivon li detruas ĉiutage, por manĝi, kiel murdisto. Ho! Kiel abomene barbara estas tiu naturleĝo, kiu altrudas konstantan murdadon!

♦ Esp/51

Por saviĝi de la alproksimiĝanta katastrofo, necesas unue civilizi la propran politikan konceptaron. La sekvenda metodo estas, por bone kaj fidele kompreni kiel ankaŭ por memori, kopii kvinfoje ĉiun tekston: kvinfoje Esp/1, tiam kvinfoje Esp/2. . . ĝis ĉi tiu teksto mem — sed LAŬTLEGANTE la tekston ne post, sed dum la skribado de la unuopaj vortoj. La lastan skribon faru en kaje-ro konservenda. Tiu procedo penetrigos en la menson la plenan signifon de la malfacilaj novaj konceptoj. Por gardi kontraŭ neglekto de laŭtleĝado (esenca afero), konsilindas fari la kopiadon du- aŭ tri-ope (almenaŭ du individuoj kune). La daŭro kaj precizeco de tiu procedo nepras por savi sin mem kaj siajn karulojn. Tiun civilizigon bezonas unue la pacifistoj, due la verkistoj kaj ĵurnalistoj, kaj trie la politikaj klientoj por sin saĝigi, t.e. malsovaĝigi, en la politika kampo.

♦ Esp/50

La transiro de profesiaj spertoj akiritaj de unu generacio, al la posta, ĉefrolis en la pasinteco de ĉiuj profesioj. Sed tio neniam okazis en la politiko, kie ĉiam regis improvizantoj. Tie neniam regis vera respondeculo, kiu severe admonus tiujn, kiuj eraras pro manko de faka sperteco. Por tion korekti, la Superdemokratio fontis a) el la psikologia malkovro de SA-PO-KLI, de la malsama konstruo de la intelektoj, ĉiutage pli maturiĝantaj, b) de "La povo" kaj aliaj verkoj de Bertrand Russell, kaj c) de la rimarkoj postlasitaj de la fama, tre akramensa ĵurnalista G. Preccolini. Russell kaj Preccolini ambaŭ travivis vivon pli ol naŭdekjaran kun ege vigla, aparte aperta menso. Kia trezoro da spertoj!



Mondharmonia Instituto
via Sport 18
I-40065 Pianoro, Italio

Sekso kaj Egaleco

La tuto
regule tra-
dukata en
la japanan.

Artikoloj kaj leteroj pri
aktuala temo: la virina
agado por sek-
sa egaleco en
la socio kaj en la Espe-
ranto-movado.

Informoj kaj provnumero (3 irk.) haveblaj ĉe: Anna
Brennan, p/a Nieuwe Binnenweg 197-B, 3021 GA
Rotterdam, Nederlando. Mendu ĉe UEA (jarabono:
14,50 gld.) aŭ petu detalojn pri naciaj perantoj rekte
ĉe Anna Brennan. Aperas kvarfoje jare.

**LA SOLA ESPERANTO-BULTENO KIU RE-
GULE APERAS ANKAŬ EN NACIA LINGVO**

KIU ESTAS LA PLEJ FAMA KRIMINAL-VERKISTO? Kia demando! Kompreneble JOHÁN VALANO

Tion ja scias ĉiu. Sed ĉu vi scias ankaŭ, ke en
1981 vi povas legi kriminal-novelon de Johán
Valano en ĉiu numero de

MONATO

internacia magazino sendependa

40 paĝoj DIN A4, riĉe ilustrita. Dek unu kajeroj
jare. Jarabono 49,50 gmk aŭ 800,- bfr. La abonon
bonvolu sendi rekte al la eldonejo: TK/Stafeto
p.v.b.a., Miksebaan 65A, B-2130 Brasschaat,
Belgio — aŭ mendu ĉe landa peranto aŭ UEA
(52,50 gld.; por Nederlando 54,60 gld.). Kion
krom noveloj de Valano vi povas legi en **Monato**,
vi vidos petinte provekzempleron kontraŭ du
internaciaj respondkuponoj. (Tamen memoru, ke
unu persono povas nur unufoje fari tian peton.)

PRI INTERNACIA LINGVO DUM JARCENTOJ

Kompilis mag. Isaj Dratwer

Eldiroj de filozofoj, verkistoj, sciencistoj, lingvis-
toj kaj aliaj pri Esperanto kaj la internacilingva
ideo. "La tre valora verko de Mag. Dratwer devas
esti rigardata kiel suplemento al tiu ĉi libro." (El
la antaŭparolo de *Esperanto en perspektivo*.) Dua
eld. (1977), konsiderinde ampleksigita kaj ĝisdat-
igita. 360p. Prezo: 30,00 guldenoj. Ĉefa distribu-
anto: Libroservo de Universala Esperanto-Asocio.

Libroj de la nova eldonejo

La Kritikanto

ekscitos interesiĝon pri nia kulturo kaj
literaturo. . .

Miyamoto m.; Sarkasme kaj entuziasme

Ĉu esperanto estas vere internacia lingvo? Ĉu
la recenzo estas nepre necesa? La ebleco de
internacia literaturo en esperanto. K.m.a.

18,— gld.

Benczik v.: Studoj pri la esperanta literaturo

Teoriaj problemoj de la esperanta literaturo.

La proza stilo en esperanto. Studoj pri Baghy,
Emba, Szilágyi, Auld, la skota skolo, Szathmá-
ri, Sadler k.a.

19,50 gld.

Miyamoto m.: Skiza historio de la utao

Utao: japana klasika poezio, kaj unu el la
multkoloraj facetoj de la japana kulturo.

12,— gld.

Mendu ĉe la Libroservo de UEA. Revendistoj
skribu al la eldonisto: s-ro MINE Yositaka,
Kitahama-Kitawaki 29-16, TAKASAGO, 671-01
Japanio.

SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ (5a sesio) UNIVERSITATO DE LIÈGE (BELGIO) 05 - 19 de julio 1981

S U K , 8 1

Sekcio E: Ekologio

1-a semajno: H. MARINOV (Bulgario),
Sociekonomia bazo de la nuntempa
ekologia krizo

2-a semajno: H. MARINOV (Bulgario),
Ekologiaj disponfontoj por elnutrado
de la loĝantaro

Sekcio P: Pedagogio

1-a semajno: H. FRANK (FR Germanio),
Propedeŭtiko de la klerigscienco
prospektiva

2-a semajno: P. DENOËL (Belgio),
Elementoj de la homa fiziologio en
rilato kun la edukado

S. LEHRL (FR Germanio),
Enkonduko en la informpsikologion
kaj ties pedagogian aplikon

Ĉiu kurso estas semajna kaj ampleksas
12 aŭ 18 lecionojn po 45 minutoj, kiuj
okazaĵ de lundo ĝis vendredo. Eblas sekvi
unu aŭ plurajn kursojn, eĉ en ambaŭ
sekcioj. Ekzamenoj. Kulturaj aranĝoj.
Perfektiga Esperanto-kurso.

KOTIZOJ: Programkostoj (unu kurso
dum unu semajno): 1 200 bf; studentoj
900 bf. Restadkostoj (sen tagmanĝoj;
modifeblaj): ĉ. 2 500 bf semajne. Perfek-
tiga Esperanto-kurso (semajne): 500 bf.

Petu detalajn
informojn kaj
aliĝilon ĉe:
SOMERAJ
UNIVERSITA-
TAJ KURSOJ,
Boîte Postale 9,
B - Liège X,
Belgio.